

ESPERANTO

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★



★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★
★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★
★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

PEREINTOJ de Pierre Lavallo (*vidu p. 149*)

N-ro 611 (10)



Oktoebro 1956

REVUO INTERNACIA

Revuo Internacia

N-ro 611 (10)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: W. AULD

Knockfarril, Thornsidge Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estrarano de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Ospedale Maggiore, Parma, Italujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

La lingva problemo en internaciaj organizaĵoj	145
Spertoj de ekspozicio	146
Procès. Yves de Junco	147
Kanzonoj. Heine (Kalocsay)	148
Pentraĵoj de Pierre Lavalle. Scobie	149
Sveda Somera Semajno	154
Kelkaj klarigoj responde al cirkulero	156

Rubrikoj

Esperantista vivo & Nekrologo	151
Tra la movado	152
La internaciaj konkursoj	153
Radio	155
Novaj libroj	158
CED	160
Radio-Babiloj	160
Oficiala Informilo	kovrilo 3

LA LINGVA PROBLEMO EN INTERNACIAJ ORGANIZAJĜOJ

*Resumo de la Raporto de Prof. Lapenna
al la 2-a Sekeio en Kopenhago*

La lingva problemo en la internaciaj rilatoj ĝenerale kaj en la interŝtataj organizaĵoj speciale fariĝas ĉiam pli komplika kaj malfacila. Ĝis la Unua mondmilito la franca estis ĝenerale uzata kiel lingvo de diplomatio kaj de internaciaj konferencoj, sed ek de la jaro 1918 aldoniĝis la angla, kiu ludis ĉiam pli gravan rolon. Ĝi akiris egalrajtan pozicion kun la franca ankaŭ en la interŝtataj organizaĵoj inter la du militoj. Ekzemple, en la Ligo de Nacioj la oficialaj lingvoj por ĉiuj organoj, por ĉiuj kunvenoj kaj dokumentoj, estis la angla kaj la franca.

Oficialaj lingvoj

La situacio konsiderinde ŝanĝiĝis post la Dua mondmilito. Oni komprenis ke la lingva demando ne estas nur pure teknika problemo de interkompreniĝo, sed ankaŭ afero de politika influo kaj nacia prestiĝo. Rezulte, la ŝtatoj klopodis kaj ĉiam pli klopodas havigi al siaj naciaj lingvoj la pozicion de oficialaj en la interŝtataj organismoj. La samo, cetere, estas rimarkebla en la neregistaraj, privataj, internaciaj organizaĵoj.

Tiele, anstataŭ la du oficialaj lingvoj de la Ligo de Nacioj, en Unuiĝintaj Nacioj estas kvin oficialaj lingvoj: la angla, la franca, la hispana, la rusa kaj la ĉina. En UNESKO oni devis oficialiĝi 8 lingvojn: la anglan, la araban, la ĉinan, la hispanan, la francan, la hindan, la italan kaj la rusan. Menciinde, ke la Interna Regularo de la Ĝenerala Konferenco precize antaŭvidas, ke ĉiu ajn alia lingvo povos fariĝi oficiala, sub rezervo, ke unu ŝtato ne postulu tiun „privileĝion” por pli ol unu lingvo. Eĉ organizaĵoj, kiuj komencis sian vivon kun du oficialaj lingvoj, kiel ekzemple la Eŭropa Konsilantaro, baldaŭ devis allasi aliajn. Hodiaŭ en la Eŭropa Konsilantaro praktike estas uzataj la angla, la franca, la itala kaj la germana, sed nenio malhelpas ke ankaŭ aliaj lingvoj ricevu la saman avantaĝon. La kvar oficialaj lingvoj de la Eŭropa Komunajo de Ŝtalo kaj Karbo estas la franca, la germana, la itala kaj la nederlanda, do sen la angla. El la institucioj de monda karaktero, kiuj ankoraŭ havas nur du oficialajn lingvojn la anglan kaj la francan — estas menciinda la Internacia Kortumo en Hago.

La granda nombro da oficialaj lingvoj kaŭzis tutan vicon da gravegaj problemoj: ekzakta traduko de ĉiuj dokumentoj, kies tekstoj, kompreneble, en diversaj lingvoj ĝuas egalan juran fidindecon (ofte la tekstoj diferencas, kelkfoje eĉ rilate la nomon de la organizaĵoj); rapida interpretado dum la kunvenoj; problemoj ligitaj kun la kostoj; kontaktoj ekster la oficialaj kunvenoj; edukado de la infanoj de la oficistoj laborantaj en la sekretariatoj ktp. Fine, la allaso de pluraj lingvoj kiel oficialaj igis la aliajn naciojn, precipe la pli grandajn, postuli samajn privilegiojn ankaŭ por siaj lingvoj. Kaj tiaj postuloj senĉese pliiĝas.

Laboraj lingvoj

Oni provis trovi partan eliron por almenaŭ kelkaj el tiuj problemoj laŭ diversaj manieroj, antaŭ ĉio per la enkonduko de nova kategorio de lingvoj, la tiel nomataj laboraj lingvoj. Ekzemple, en U.N. originale la laboraj lingvoj estis nur la franca kaj la angla. Sed ek de la jaro 1947 la hispane parolantaj ŝtatoj-membroj komencis postuli, ke ankaŭ

ESPERANTO EN CEJLONO

La Ŝtato uzas Esperanton kaj preparas Budhanan literaturon en Esperanto.

Esperanto en la Budhana Enciklopedio de Cejlono

Pro la klopodoj de nia cejlona samideano, Sanghano Njanassatta, la plej altaj ŝtataj instancoj de Cejlono uzas Esperanton en la tutmonda Informado pri Cejlono kaj Budhismo; li ankaŭ helpis kolekti materialon por „La Infanoj de la Mondo”, Geografio, kiu estas preparata en Japanujo pere de Esperanto. Pro la favora helpo de la ŝtato (per presigo kaj dissendo al preskaŭ ĉiuj lernejoj de ĉirkulero petanta pri materialo por la cejlona parto de la volumo pri sud-Orienta Azio, nun en presado), kaj pro favoraj raportoj en ĉiuj anglaj gazetoj de Cejlono pri tiu Geografio, Esperanto estas sukcese akceptata kiel grava faktoro en rilatoj internaciaj.

Pro tio, Universitata profesoro Dr. G. P. Malalasekera, O.B.E., M.A., D. Litt. Ph. D., Profesoro de la lingvo Pali kaj Budhana Civilizacio, ĉefredaktoro de la Budhana Enciklopedio, nun preparata en Cejlono kun plena ŝtata subteno, komisiis s-anon la Sanghanan Moŝton Njanassatta prepari por la Enciklopedio ĉiujn artikolojn pri la historio de Budhismo en la Okcidento, precipe en Eŭropo de kie oni ne povas akiri materialon per la angla lingvo, kiu estas uzata en Cejlono kiel ŝtata lingvo. La samideano jam verkis kaj liveris dek ses artikolojn por la Enciklopedio, nome pri Budhismo en Eŭropo, en Ĉeĥoslovakio, Esperanto kaj Budhismo en Esperantujo (inter esperantistoj), Budhana Ligo de Esperantistoj, Budhismo en Esperanta Literaturo de la mondo, kaj pri la utileco de Esperanto en internaciaj rilatoj, kie la uzebleco kaj utileco de la angla lingvo ĉesas. Nia samideano estis plue komisiita pri la tasko kolekti plian materialon pri: BUDHISMO en Jugoslavio, Bulgarujo, Rumanujo, Grekujo, Polujo, Rusujo Eŭropa, Latvujo kaj la landoj Baltikaj. Samideanoj estas petataj kontakti ĉiujn interesitojn pri Budhismo, ĉu unue en tiaj landoj mem, ĉu inter rifuĝintoj. Ni bezonas precizajn faktojn pri la budhanaj studoj en tiuj landoj, Budhismo en la literaturo, pri la aŭtoroj de tia literaturo, precipe se ili estas influataj de Budhismo, kaj se ili fondis budhanajn societojn en siaj landoj. Nomoj de la verkoj, aŭtoroj, jaro kaj loko de publikigo, enhavindiko, kaj ion pri la aŭtoroj: tiun ĉi informon donos granda bibliotekisto aŭ profesoro de orientaj lingvoj kaj literaturoj, do oni povas akiri ĝin kaj sendi al ni en Esperanto aŭ en la angla traduko rekte al: Prof. Dr. Malalasekera, Ĉefredaktoro, Budhana Enciklopedio, University of Ceylon, Peradeniya, Ceylon, Aŭ al: Budhana Esperanto-Instituto, Kolatenna Hermitage, Bandarawela, Ceylon.

la hispana fariĝu laborlingvo. Post longa batalo ĝi estis allasita kaj tio kostis al U.N. pliajn 534.000 dolarojn jare (laŭ la raporto de la Sekretariato). Kompreneble, tuj la ŝtatoj de Orienta Eŭropo kaj Ĉinio postulis, ke ankaŭ la rusa kaj la ĉina fariĝu laboraj. Laŭ la raporto de la Sekretariato, la allaso de la rusa kostus aliajn 645.000 dolarojn kaj tiu de la ĉina pliajn 900.000 dolarojn. Kiel oni vidas, la kategorio de „laboraj lingvoj” ne solvis la problemon. Novaj luktoj pri la lingvo ekestis kaj ili certe ankoraŭ ne finiĝis.

En UNESKO, por doni alian ekzemplon, el la 8 oficialaj lingvoj, oni fine, ek de la Konferenco en Montevideo (1954), akceptis 4 laborajn: la anglan, la francan, la hispanan kaj la rusan. En tiuj 4 lingvoj estas publikigataj ĉiuj dokumentoj, protokoloj de la kunsidoj, kiel ankaŭ la Oficiala Ĵurnalo de la Konferenco. Kiom tio ŝarĝas la budĝeton de UNESKO ne estas konate, sed la ciferoj publikigitaj por U.N. povas doni sufiĉe klaran ideon.

Plue, en UNESKO oni povas aldoni plian laboran lingvon. Kiam, nome, la Ĝenerala Konferenco okazas en iu lando, kies lingvo ne apartenas al la laboraj, la Plenumkomitato de tiu organizaĵo estas rajtigita fari specialajn aranĝojn rilate la utiligon de tiu lingvo kiel labora. Tio signifas, ke en kelkaj kazoj povas esti eĉ 5 laboraj kaj minimume 8 oficialaj lingvoj. Se oni aldonas, ke en la interŝtataj organizaĵoj — ankaŭ en la Internacia Kortumo — estas ĝenerale rekonita la rajto de ĉiu paroli en kiu ajn lingvo, sed sub la kondiĉo, ke li mem prizorgu la tradukon en unu el la laboraj lingvoj (la koncerna organizaĵo devas prizorgi, kompreneble, la retradukon en la aliajn), oni komprenos la haoson, kiu facile povas ekesti kaj fakte okazas.

★ ★

Spertoj de Ekspozicio

En la urbo Rosario estis inaŭgurata grava komerca pasejo, la unua en tiu urbo, en kiu instaligis gravaj kaj luksaj butikoj. Rosario Esperanto-Asocio sukcesis atingi prunte salonon neokupitan, kaj tie aranĝis ekspozicion, kiu daŭris pli ol unu semajnon.

Antaŭ la ekpretigo de la ekspozicio la tieaj gesamideanoj longe pristudis la aferon, ĉar la salono pruntedonita estis situanta en la unua etaĝo kaj tial ne tuj atingebla de la publiko. Krome malgraŭ ke la tuta fronto de la salono estis el vitro, la pordo ne estis larĝa kaj ne alloga la eniro.

Pere de la fotoj la leganto rimarkos

kiel oni distribuis la materialon sur la muroj, zorge oni fiksas kartonajn tabulojn sur kiuj estis montrataj la esperantajj laŭ fakoj kaj kun klarigaj tekstoj. Oni evitis la amasiĝon de materialo kaj kiam ĝi ne estis sufiĉe esprimoriĉa estis desegnatataj grafikoj.

En la montrofenestro estis ekspoziciataj la tradukitaj verkoj, precipe la klasikaj. Sur longa tablo estis dissemataj la libroj sed sufiĉe orde kun klarigoj, ĉu ili estis tradukitaj, originalaj, k.t.p.

Restis nur la problemoj, kiel enirigi la homojn en la salonon? Je tiu celo ĉe la pordo estis metata afiŝeto kun la jena skribo „Enirul, en 3 minutoj ni instruos



S-no Hugo A. Lingua faras „paroladeton” al kelkaj ĉeestantoj.



Angulo de la ekspozicio

al vi kiel lerni Esperanton”. Krome en la interno pli granda afiŝo invitis aŭskulti kanzonojn en la Internacia Lingvo kantatajn de Hugo Moyano Vargas, tre populara kantisto en Rosario. La kanzonoj estis enbendigitaj kaj luditaj per magnetofono.

La preterpasantaj homoj estis altirataj kaj eniris en la salonon, sed tiam la organizaĵo rimarkis ke ĉiuj gape rigardis sed neniu demandis aŭ montris ian intereson, kaj post kelkaj minutoj ili foriris tiel facilanime kiel ili eniris.

Tiam post interkonsento la samideanoj faris la jenon: kiam en la salono estis du aŭ tri personoj, esperantisto alproksimiĝis al unu el ili kaj diris: „Se vi permesas sinjoro, mi tre volonte klarigos al vi kio estas Esperanto”, preskaŭ ĉiam aŭ ĉiam la alparolito akceptis, kaj tiam la samideano komencis per mallaŭta voĉo sian klarigadon. Tuj unu el la aliaj enirintoj alproksimiĝis kaj tiam la parolanto pli laŭtigis la voĉon, iom post iom novaj homoj ariĝis ĝis finfine la klariganto devis krei por ke la amaso plenganta la salonon povu aŭskulti bone. La paroladetoj daŭris dum 10 ĝis 15 minutoj, kaj por montri la finon oni aŭskultigis unu el la kanzonoj.

Pere de la flugfolioj disdonitaj, la enirintoj en la salono estis kalkulataj proksimume je 5.000 personoj en la tago de la inaŭguro. Kaj la elmontro daŭris pli ol unu semajnon.

La efiko de la propagando devenis de la fakto ke ĝi estis persona, kaj tial multe pli fruktodona. Tio estis konstatebla pere de la multnombra enskribiĝaro al la kurso, kiu sekvis al tiu ekspozicio.

Por la paroladetoj kaj „atakoj” al la publiko, multe helpis la iama legado de „Kredu min sinjorino” de Cezaro Rossetti.

Enrique Kohel

PROCÈS

„PROCÈS“ (Proceso) estas la titolo de la plej nova romano de la blinda verkisto Yves de Junco, (eldono *Maison des Intellectuels*.) Tiu verko, vendata profite al la Orfejo de Orange (Francujo) enhavas belajn ilustraĵojn, faritajn de S-ino Andrée Clement, instruistino ĉe la Collège Moderne d'Orange.

Kiel la titolo indikas, tiu libro estas proceso, kontraŭ la milito, sed plie ĝi estas atesto je la favoro de tiuj, kiuj postlasis en batalo tion, kion ili plej alte taksis de la tuta korpo: la okulojn.

La romano estas certe aŭtobiografia ĉar oni en ĝi trovas la aventurojn de tiu franca soldato de la lando de Armor kiu perdis la vidpovon per la perfida gesto de vundita malamiko kiun li volis helpi.

„Procès“ estas grandioza libro, facile legebla pro stilo konversacia, simpla kaj klara, kaj ĝi alportas al ni lecionon: ke nenio estas tute senutila.

EKSTRAKTO

— „Plouarnec, 3-minuta haltado... Plouarnec, 3-minuta haltado... Vojaĝantoj por Saint-Brieuc ŝanĝas la vagonaron, perono 4... Plouarnec, 3-minuta haltado...”

Laŭ bruo de grincanta ŝtalo, la peza veturilo bremsiĝas, senespere senspira... kaj ekhaltas. Preninte la valizojn, pasante jen kaj jen sur erara piedo, Odette kaj mi eliras la vagonon dronintan en mal-lumo kaj eniras koridoron plenan je revenintaj militkaptitoj... Ankaŭ ili devas esti kaptitaj de la sama emocio... Ankoraŭ kelkajn paŝojn kaj:

— „Atentu la ŝtupon, André kara...”

Tremanta maneto kaptas la mian.

— „Panjo!”...

Mi fermas la brakojn sur fragila silueto kaj miaj lipoj, en senordaj kisoj, falas sur frunton sur kiu la sulkoj jam faris desegnon, sur buklojn — iam blondajn, nun striitajn de arĝento... Mi povas nur balbuti:

„Pardonu, Panjo kara, pardonu...”

Tiam voĉo, kiun la senfinaj jaroj de atendado rompjis, haltigas min:

— Ĉesigu tion! Kaj prezentu al mi vian junan edzinon.

Post iom da tempo, kradpordo malfermiĝas kaj ni penetras en la ĝardenon, en kiu ĉiu stadio de mia infanaĝo evoluis. Sub miaj paŝoj la ŝtonetoj krietas pro ĝojo kaj mi bezonas nur etendi la manon por ricevi la kareson de la rozoj. Kia profunda emocio! Bildoj aperas kun eksterordinara klareco. Kiel bela povas esti la vivo, eĉ sen la vidpovo!

Kaj nun ni troviĝas en la granda vestiblo al kiu la ĉambroj de la teretaĝo malfermiĝas, dekstre la manĝoĉambro, kun la delikate ĉizitaj mebloj, faritaj de niaj bretonaj artizanoj. En unu angulo la



Yves de Junco

staranta horloĝo, kiu aŭdigas laŭtesian tik-tak-on regulan kaj monotonan. Tute proksime, la ŝpinrado kiu multfoje ekscitis mian scivolemon knaban. Poste la ĉambro kiun mi okupis antaŭ mia foriro al Parizo; ĉio estas tie kvazaŭ religie konservita.

Komprenante la dramon kiu ludigas en mi, la plorojn kiuj strangolas min, Patrino tiras nin al la kuirejo kies tablo prezentas al ni, sur senmakula tuko, la tradician buterpoton kaj la multegajn produktojn de nia Armor.

— Antaŭ ol vi altabliĝos, vi sendube volonte banos vin, Odette. Tio forprenos la malpuraĵojn kaj la lacecon de la vojaĝo. Venu.

Kaj la du virinoj foriras kune. La pordo fermiĝas.

Per paŝo hezita, kiun mi dezirus pli firma, mi antaŭeniras en la ĉambro kaj trovas la grandan telermeblon; la kamenon kun la nigraj hundoj. Necesas, ke mia blindeco ne estu ŝarĝo por kara estaĵo...

Malpeza mano kovras la mian.
— Venu, mia infano, venu sidiĝi apud mi.

Kun unu genuo sur la tero, premante kontraŭ mia koro la maldikajn fingrojn de tiu, pro kiu mi ploris dum 4 jaroj, mi divenas tra la tenebroj dolĉan rigardon, vizaĝon sur kiu la larmoj faris terurajn sulkojn. Mi volas diri tiom da frazoj sed la vortoj restas en mia gorĝo.

— Ho, kial mi ne povis vidi vin dum tiel longa tempo, aŭdi vian voĉon, forigi de vi la suferojn, la zorgojn...

— Kio estas tio kompare kun la kruco, kiun vi devas porti, mia filo. Sed tiu punkto estas nur provizora, ĉu ne? Baldaŭ vi revidos la lumon, ĉu ne?

Mallevante la kapon por ke ŝi ne vidu mian vizaĝon, mi flustras milde-mensoge: „Jes, Panjo, jes.”

(Trad. M. C. Major. La aŭtoro aĉable permesis aperigon de la supra ekstrakto, ne petinte por tio iun ajn autor-raĵton.)

KONKURSREZULTO

Jen la rezulto de nia Krukvortenigmo (Esperanto, junio 1956):

El la ricevitaj solvoj 28 estis tute korektaj. Libropremiojn ricevis laŭ lotumo:

S-ro H. EVERS, Reinaldstraat 4, Velp (G), Nederlando.

S-ro Joze SREBRNIC, C.IX. Korpusa 24/11, Nova Gorica-Solkan, Jugoslavio.

F-ino J. J. V. THIEL, Nieuwe Weg, 15, Amsterdam O, Nederlando.

SOLVO

FAKIR PEG SUKER
UNU EPITETO ATE
NOVEL RAN KULET
E EPOKO OPONI I
LATO ELITA IKON
P SUR N VEK R
POPOL KOT BANAL
ALE ARAKIDO EKI
KOTON LUN NITON
G ZON L KOM L
MITO UPILA IZOL
E ENIRI UZITE A
REGOL ROK RILAT
IRO AKAPARI OPI
TALER NAN SATIR

Ŝlosilvortoj: Denominatoro; Taksimetro; Profilaktika; Universitato; Arkitekto; Paralelogramo; Reprezentanto; Polikliniko; Uverturo; Palankeno; Kolegino; Kandelingo; Parlamentanino; Labirinto; Kapitelo; Kazeino; Kuzineto; Ululo de lupo; Pelikano.

En la mirinde bela Maj',
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor' la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinde bela Maj',
dum birda tril' ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfesis.

★

La rozo, lilio, kolombo, sunlumo,
jen kiujn mi amas en amvoluptumo;
ne amas plu ilin, amas ŝin nuran,
la fajnan, la puran, la gracistaturan.
Ŝi, fonto de amo, estas en sumo
mem rozo, lilio, kolombo, sunlumo.

★

Vin kantflugile, kara,
mi portus de tie ĉi.
Sur Ganges-bordo lokon
belegan ja scias mi.

Ruĝflora ĝarden' tie kuŝas
en lunlumita kviet',
la lotusfloroj atendas
je l' kora fratinet'.

Violoj ridetas, kisas,
rigardas al stela ĉiel',
fabelojn odorajn rozoj
flustras al ŝi ĉe orel'.

Spionas la piaj, saĝaj
gazeloj, saltas kun baŭm',
la sankta river' lontane
susuras per sia ŝaum'.

Kaj tie ni por ripozo
kuŝos sub alta palm',
kaj trinkos amon, pacon
kaj sonĝos pri fea ĉarm'.

★

Kial do palas rozoj de l' kort',
ho diru, amatinet'!
Kial do sidas en mutio de mort'
la violoj de l' herbobed'?

Kial do sonas alaŭda kant'
nun kiel plenda plor'?
Kial do el la balzama plant'
haladzas kadavr-odor'?

Kial rigardas kampojn la sun'
enue, fride, sen klar',
kial la ter' tiel grizas nun,
dezerta kiel tombar'?

Kial mi tristas, malsana je l' kor',
ho diru, plej dolĉulin'!
Ho diru, plej amata trezor',
Kial forlasis vi min?

★

Fraŭlino ĉe la maro staris
kaj ĝemis kun sopiro,
kortuŝon tiel grandan faris
al ŝi la sunsubiro.

Fraŭlin' gajigu senbedaŭre,
vin olda scen' katenas:
la sun' foriras ĉi-antaŭe,
postdorse ĝi revenas.

★

Vi havas diamantojn kaj perlojn
kaj ĉiom da tera valor',
vi havas plej belajn okulojn,
pli — kion vi volas, trezor'?

Pri viaj belaj okuloj
mi faris por via glori'
armeon da kantoj eternaj,
pli — kion vi volas, trezor'?

Per viaj belaj okuloj
vi min turmentis sen kor',
kaj min ruinigis komplete,
pli — kion vi volas, trezor'?

★

El la Mondliteratura Trezoro:

Kanzonoj de HEINE

Se junaj koroj krevas,
ridegas supre la steloj,
ridegas ili kaj diras
en fora blu' de l' ĉielo:

„La povraj homoj amas,
la amon plenkore sentas,
kaj tamen sin affliktas,
eĉ morte sin turmentas.

Neniam ja ni sentas
la amon, kiu portas
al povraj homoj pereon.
Jen kial ni senmortas.”

★

La somer-vesper' silentas
super kampo kaj arbaro,
refreŝige la lun-klaro
en ĉiela blu' argentas.

Ĉirpas gril' ĉe rivereto,
io en la akvo plaŭdas,
la migranto lirlon aŭdas
kaj spiradon tra l' kvieto.

Tie banas sin proksime
bela elfinet' en solo,
blankaj brakoj, ĉarma kolo
en lunlumo brilas glime.

★

Kie, laca vagabondo,
trafos mi al lasta hejm'?
Ĉu sub suda palmofrondo?
Sub tilio apud Rejn'?

Ĉu min en dezert' enfosos
haste ies fremda man',
aŭ en sablo mi ripozos
borde de la ocean'?

Kie ajn! Min la ĉielo
brakos, kiel tie ĉi,
kaj funebro-lampe stelo
ŝvebos nokte super mi.

★

Softe vibras tra l'animo
melodi' tenera,
flugu al la malproksim',
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',
kaj se tie ĉarme
ridos roz', en mia nom'
ŝin salutu varme.

★

Adamo la unua

Kun flama glav' ĉielĝendarmojn
vi sendis al la pordo,
forpelis min el Paradizo
sen rajt' kaj mizerikordo.

Kun la edzino al land' alia
mi iras la vivon aranĝi,
sed, ke mi manĝis el frukto de l' scio,
vi tion ne povas ŝanĝi.

Ne povas vi ŝanĝi, ke mi scias,
kiel vi estas malgranda,
eĉ se vi ege vin volas gravigi
per morto kaj fulmo tondranta.

Ho Dio, mizera ja estas ĉi tiu
consilium abeundi,
Jen kion mi nomas magnificus
de l' mondo, lumen mundi.

Neniam sentos mi la mankon
de l' Paradiz-kampoj ĝuaj.
Ne estis ĝi vera paradizo:
troviĝis arboj tabuaj.

Mi volas la plenan liber-rajton!
Plej eta bara ordono
la Paradizon por mi faras
infero kaj prizono.

El „Lazarus”

Lasu piajn hipotezojn,
lasu sanktajn parabolojn,
provu la demandojn damnajn
solvi sen preterparoloj.

Kial trenas sin sub kruco
sange la justul' mizera,
dum en alta sel' felice
trotas malicul' fiera?

Kies kulpo? Ĉu l' Sinjoro
mem ne ĉiopovas plene?
Aŭ li mem ĉi misojn faras?
Ha, ja estus abomene!

Jen demandas ni persiste,
ĝis per plena man' da polvo
oni ŝtopas nian faŭkon.
Sed, ĉu tio estas solvo?

Tia la mondo


Kiu havas multe, baldaŭ
havos eĉ pli grandan riĉon,
kiu havas nur malmulte,
perdos eĉ la nesufiĉon.

Kaj se vi nenion havas,
enterigu vin prefere,
ĉar vivrajton, tramp', nur havas,
kiu ion havas tere.

el la germana trad.
K. Kalocsay

Pentraĵoj de Pierre Lavallo

„Sur spacremparoj la poeto tronas,
Nek tempon nek brakumon konas”.




Arton oni kreas en izolo. Tio ne signifas ke la artisto estas kontraŭulo de la popolo, ĝi signifas nur, ke li estas ribelulo. Artisto en epoko de kredomanko devas esprimi sian fidon. El Glasgovo, industria kaj atomfizika urbego, venas nova deklaro pri fido je la simplaj, solidaj flankoj de la vivo kaj vivado. Pierre Lavallo havis flandrajn praparencojn, kaj el la pasinteco li tiras grandajn potencrezervojn, kiuj animas personan esperon kaj fidon je la Homo kaj la Dio.

Lia fido je Dio radias de sur la muroj dum oni studas liajn religiajn pentraĵojn. La farbo estas dike ŝmirita, deklarante lian kredon; la figuroj estas desegnitaj fortike kaj certege. Simplaj puraj kolormasoj komplementas unu la alian, konstruante kvazaŭ predikon. La polureco de liaj akvareloj kaj desegnaĵoj estas tie flankenlasitaj, ĉar la temon li volas trakti kun integro. Ekde liaj fruaj pezaj dipatrinoj ĝis la freŝa mirinda



Maljunulino



Agonio

kapo de Judaso kun ties bizantia belo, trakuras neestingebla flamo de veremo.

En du novaj verkoj vidiĝas alispeca fido — fido je la Homo. Mi aludas verkojn pri maljuna kamparanino kaj pri terlaboristo vespere hejmeniranta. La pezaj ostecaj kamparaj figuroj devenas de la flandraj prauloj de Lavallo, kaj perfekte peras lian fidon je la simplaj valoraj vivaspektoj. Ili estas kuraĝe konceptitaj, sed delikate faritaj. La maljunulino sidas tenante kokinon sur la femuroj. Duraj linioj bildiĝas ŝin, sed se oni zorge esploras la fonon, oni vidas kiel delikata ĝi estas, kiel pacience ĝi estas kreita tiel, ke ĝi verŝajne enhavas ĉiujn kolorojn kvazaŭ papilia flugilo. Estas tio, kio levas pentraĵon de la nivelo de videbla ĵurnalismo ĝis la nivelo de artverko. Tial maljunulo, amaso da pereintoj aŭ religia simbolo

fariĝas belaĵo, io dezirinda.

Ni trovas do artiston, kies arto varias inter la altaj turmentoj de religia sinesprimo kaj malofteca humuro kaj okazaj eruptoj de rabeleza vigleco. Ni trovas Pacon kaj Fidon kaj homamon, esprimittajn lerte kaj per pramalnova respekto, en nia epoko malofte, al faksperto. Ke ĝi atingas nin el industria komunumo ŝajnas signi-

foplene. Tio, laŭ mi, mezuras la gravecon de Pierre Lavallo.

W. Scobie

Pierre Lavallo ilustris la poemon *La infana raso* de William Auld (eld. Stafeto, 1956). Ni volonte prestigis de tempo al tempo artikoletojn pri artistoj, kun specimenoj de ilia verko, se ni ricevus ilin. — Red.


William Wordsworth (1770-1850)

Spiriton mian dorm' blindigis

*Spiriton mian dorm' blindigis,
Kaj mankis homa timo;
Sur ŝin laŭŝajne ne efikis
Tereca jaroŝimo.*

*Senpova kaj senmova nun
Nek aŭdas ŝi nek vidas,
Sed kiel rok' kaj arbo kun
Ruliĝa ter' orbitas.*

El la angla: W. AULD



- 1 D-ro Zamenhof
- 2 S-ino Zamenhof
- 3 S-ro Michaux
- 4 S-ino Bergier
- 5 S-ino Finez
- 6 S-ino Duvoy
- 7 S-ino Zabilon d'Her
- 9 S-ino Mitchell
- 10 F-ino Feuillette
- 11 S-ino Sergeant
- 12 S-ino Pannevin
- 14 S-ino Boling. Mudie
- 15 F-ino Schaffer
- 16 F-ino Cederbald
- 17 F-ino Junck
- 18 F-ino Rommel
- 21 S-ino B. . .
- 22 S-ino Theis
- 24 S-ino Richard
- 25 S-ro Van der Biest
- 27 S-ro Grabowski
- 28 S-ro Boling. Mudie
- 30 S-ro Schneeberger
- 32 S-ino Capé
- 34 F-ino Junck
- 35 S-ro Capé
- 36 S-ro Seynaeve
- 37 F-ino Farnes
- 38 S-ro Brunet
- 39 S-ro Bilbocq
- 40 L-to Lucas
- 44 S-ro Dervaux
- 45 F-ino Desmarest
- 48 S-ino Rust
- 49 S-ro Rust
- 51 D-ro Ostrowski
- 53 S-ro de Conninck
- 56 S-ro Ducros
- 57 S-ro Farnes
- 58 S-ro Simon
- 61 S-ro Hoskisson
- 62 S-ro Offret
- 68 S-ro Chavet
- 71 S-ro Duchochois
- 74 S-ro Sergeant
- 76 L-to Dupont
- 77 S-ro Mathon
- 79 S-ro Balik
- 81 S-ro Doré
- 83 S-ro Nicolle
- 84 D-ro Mybs
- 85 S-ro Hanauer
- 86 S-ro Meyer
- 92 S-ro Beaucherain
- 93 S-ino Rhodes
- 94 S-ino Blott
- 95 S-ino Reeve
- 97 Ing. Kunhl
- 98 S-ro P. Nylen
- 99 S-ro Wicart
- 100 F-ino Barret
- 103 S-ro V. H. D'Oosthove
- 104 S-ro de Subira
- 106 S-ro Deshays
- 107 S-ro Moch
- 109 S-ro Boirac
- 110 Abato Peltier
- 112 S-ro Kahn
- 113 S-ro Southee
- 114 S-ro Ed. Privat
- 115 F-ino Birch
- 116 S-ro Blott
- 117 S-ro Céfec
- 118 S-ro Birch
- 120 S-ro Borson
- 122 S-ro de Bièvre
- 129 D-ro G. Maillard



En Israellando gastas nun (Julio 1956) la speciala sendito de U.E.A. s-ro Tibor Sekelj.

Lia vizito en nia lando multon kontribuis al la plia stimulado de la ĉitiea poresperanta agado. La enlanda gazetaro dediĉis al li favorajn artikolojn. Liaj prelegoj pri liaj antropologiaj esploraj vojaĝoj tra la Brazila Amazonio (kun lumbildoj), en lingvoj Esperanto, angla, hungara kaj serba, elvokis streĉan interesiĝon de la vasta publiko.

Same kiel en Jugoslavio, Grekujo kaj Turkujo, penis s-ro Sekelj ankaŭ ĉi tie, varbi inter la regnestraj rondoj de Israellando pozitivan sintenon rilate al l'enkonduko de Esperanto en la enlandan vivon kaj en la uzadon en la internaciaj institucioj de UNO kaj Unesko gvidataj.

Tiucele estis s-ro Sekelj akceptita, kune kun la skribanto de ĉi tiuj linioj, ĉe la Prezidanto de la Respubliko, s-ro Ichak Ben-Cvi, dufoje. La landprezidanto deklaris proksimume jene:

„Nia ŝtato estas demokratia; por akiri

gravan ŝtatdecidon oni antaŭe devas akiri por ĝi la popolopinion. Tial propagandu la esperantismen kaj varbu por ĝi adeptojn inter la vastaj popoltavoloj kaj inter la instruistoj. La simpatioj de la regnestraj rondoj akompanos viajn penojn. Ankoraŭ estas tro frue plani pri la enkonduko de l'Esperanto en la ŝtatuzon. Sed kiam pri tio ĉi interkonsentos pluraj pli grandaj ŝtatoj, Israel ne postrestos la lasta.”

Pri la samaj temoj havis s-ro Sekelj seriozajn intertraktojn, kun similaj rezultoj, en Ministerio por Edukado kaj Kulturo kaj en Eksterafera Ministerio.

Sur la aldonita fotobildo aperas en la centro s-ro Ichak Ben-Cvi, la Prezidanto de Israellando; dekstre de li — s-ro Sekelj, kaj maldekstre la gimnaziprofesoro J. Kohen-Cedek, delegito de UEA en Jerusalemo kaj vicprezidanto de Esperanto-Ligo Israellanda. La foto estas farita en la rezidejo de la Prezidanta Moŝto en Jerusalemo.

J. Kohen-Cedek

Kiom da Samideanoj, ĉeestintaj la Kongreson en Boulogne-sur-Mer 1905, ankoraŭ vivas ?

En la Revuo Esperanto Junio 1955, p. 178, H. Jakob skribis tion:

„Malgraŭ zorga ekzameno mi povis trovi nur kvar nomojn de partoprenintoj ankoraŭ vivantaj: Generalo BASTIEN, Carl BARTHEL, Gabriel CHAVET, Edmond PRIVAT”.

Mi tiuj skribis al li por informi lin pri lia eraro kaj mi nomis aliajn ĉeestintojn:

P. Nylen nro 98 sur la foto
Ch. Brunet 38
Dro G. Maillard 129
P. Boulet

Dro E. Dauzats

S-ino Dauzats

F-ino Cécile Royer, kiu aldonis Comte 3 nomojn Grosset

Pastro Warot

Do, entute, almenaŭ 14 postvivantoj ĉar verŝajne aliaj ekzistas.

D-ro G. MAILLARD

D-ro G. MAILLARD, 14 rue Ravon, Bourg-la-Reine (Seine), Francujo, antaŭdankas la personojn kiuj povos sendi al li sciiĝojn por kompletigi aŭ korekti tiun nomaron.

Naskigo

Petkoviĉ. Al Delegito de UEA en Sibenik, Jugoslavio, s-ano Rade Petkoviĉ, kaj lia edzino Anka, naskiĝis filo nomita Zoran. S-ano Petkoviĉ estas Sekretario de la Societo „Stjepan Niniĉ”.

Geedzigoj

Espinosa-Scasso. La 6an de julio 1956, en la preĝejo San Rafael Arcangel, Buenos Aires, geedziĝis s-ro Hector Guillermo Espinosa kaj f-ino Esther Nélida Scasso.

Hruby-Prochazkova. S-ano Oskar Hruby kaj s-anino Milada Prochazkova, membroj de esperantista klubo „La Progreso” en Ĉ. Budejovice, Ĉeĥoslovakio, geedziĝis la 25an de aŭgusto 1956, ĉe la urba Nacia Komitato kaj en Katedrala Preĝejo de Sankta Nikolao.

De Vries-Tuitjer. Geedziĝis Dirk de Vries kaj Antie Tuitjer. Nuna adreso: Den Haag, Laakkade 60, Nederlando. (Aliaj detaloj mankas.)

NEKROLOGO

Andrews. La 2an de junio 1956 mortis Lionel C. Andrews, iama sekretario de la Grupo en Sutton, Anglujo.

Schmidt. La 12an de majo 1956, pro koratako, mortis en Nov-jorko s-ano Berthold Schmidt en aĝo de 82 jaroj. Li estis Ĉefdelegito de UEA 1925—1935, kaj multe laboris. Interalie li disaŭdiĝis Esperanto-lecionojn je diversaj radiostacioj en kaj apud Novjorko. Dum la lastaj jaroj li laboris je kunigo de trilingva poemaro (Esperanto, angla kaj la lingvo en kiu la poemo estis originale verkita), al kiu estus aldonita Esperantogramatiko. Lia vidvino, Louisa H. Schmidt, al kiu ni esprimas nian sinceran kondolencon, esperantistiĝis en 1933, kaj esperas publikigi la supre menciitan poemaron je la memoro de sia edzo.

Nia kovrilo 1957

En nia juli-aŭgusta numero, p. 108, ni petis, ke niaj legantoj sendu al ni desegnaĵojn por nia kovrilo 1957.

Nun ni povas anonci kun granda plezuro, ke dank' al la malavareco de nia vic-prezidanto kaj lia edzino, gesinjoroj Holmes, Londono, kiuj tiucele aĝable donacis tiun sumon, ni aljuĝos premion de 5 anglaj pundoj (200 steloj) por la elektota kovrilo.

Ni atentigas la legantojn, ke la limdato por la kovril-projektoj estas la 15a de oktobro, 1956. Oni sendu ilin rekte al nia redakcia adreso.

Tra la Movado

Laŭ decido de la Komitato de UEA, la revuo ESPERANTO havos konstantan rubrikon dediĉitan al la junularo kaj redaktatan de la junulara sekcio. Ĉion por la redakcio de la junulara rubriko oni sendu al Nicla Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italujo.

„Bulteno” de la Asocio de Esperantistoj en Pollando informas, ke konata esperantista pioniro kaj unuaranga stilisto *Kabe* (D-ro K. Bein), estante nun 84-jara, revenis al la esperanto-movado, partoprenas la kunvenojn de esperantistoj en Lodzo, kie li loĝas, kaj vigle interesiĝas pri la nova eldono de „La Faraono”, kies majstra tradukinto li estas.

La esperantista kulturo konsistu ne nur el verkoj literaturaj kaj sciencaj, sed ankaŭ el originala esperantista muziko. Per muzikaĵoj oni povas tre facile penetri en radioprogramojn kaj artprezentadojn neesperantistajn, se ili estas bone presitaj. Valorajn originalajn verkojn oni povus krom tio ankaŭ surdiskigi, por ricevi unuarangajn propagandilojn nepre konvinkajn. Ne mankas tiaj verkoj; sed mankas ĝis nun eldonisto. Kiu estas preta dediĉi la atenton kaj la bezonan sumeton por aperigi taŭgan serion de komponaĵoj (kantoj, k.s.)? Interesiĝantoj estas petataj kontakti la redaktoron de „Esperanto”.

Gojiĝa kaj solena vespero estis en la centra esperanto-kunveno en Budapeŝto la 28-an de junio. La proksimume 60 ĉeestantoj el ĉiuj partoj de la hungara ĉefurbo amike akceptis membron de TKKE el Praha: dron Jaramir Jermác, kiu vojaĝinte al la Landa Kongreso de Bulgara Esperanto Asocio en Sofia, unu tagon pasigis en Budapeŝto.

Dum lia ĉeesto okazis kun li ankaŭ oficiala preparolo pri kunlaboro inter TKKE kaj la hungara Landa E. Konsilantaro kaj oni interkonsentis, ke delegitoj de la HLEK partoprenos laŭeble ĉe la ĉeĥoslavaka Esperantista Landa Konferenco en Olomouc.

Post kelk-jara paŭzo denove ekiris hungaraj al eksterlanda esperantista kongreso. Al la bulgara kongreso en Sofia vojaĝis 5 personoj, el ili 3 kun oficiala deĵor-pasporto, kiel delegitoj de la Landa Esperanto-Konsilantaro. Ĝin budapeŝtaj esperantistoj amike adiaŭis ĉe la stacidomo.

Al la 50-a kunveno de la „Paco” Esperanto Rondo kunvenis en la V-a distrikta Kulturdomo pli, ol 200 esperantistoj, inter ili multaj, kiuj eĉ de jardeko ne vizitis kunvenon. Julio Baghy salutis la ĉeestantojn, unuavice karan gastinon el Sovetunio, la estonan samideaninon Elinjo Linnusa el Tallin, kiu faris mallongan paroladon, transdonante la salutojn de la estonaj esperantistoj kaj raportante pri sukcesa progreso de la movado en Sovjetunio.

UEA ĵus eldonis ilustritan poŝtkarton kun bildo de la Administra Oficejo. Tiun ĉi utilan propagandilon oni povas ricevi de la A.O. de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam po unu stelo.

Represajoj tradukitaj el „Esperanto”. En „Ningjō Gekijō” (La Pupa Teatro), marto 1956, aperis japanlingva traduko de la artikolo „Teatraj pupoj” de Lionel Lench („Esperanto”, majo 1955), en traduko de T. Kurisu. En „Timinn”, grava islanda taggazeto, aperis la artikolo „Esperanto en la sveda parlamento” de Einar Dahl („Esperanto”, junio 1956), tradukita en la islandan de Baldur Ragnarsson.

Grava pola gazeto „Ilustrowany Kurier Polski”, en siaj numeroj 3615 kaj 3616, dediĉis artikolojn al esperantistaj aferoj, inkluzive la recenzojn pri „Sinjoro Tadeo”, kiu aperis en nia numero de junio 1956, kaj la esperantan eldonon de „Polska”, pri kiu ni raportis en la septembra numero.

„The Plough”, organo de la Bruderhof-Komunumoj (vd. „Esperanto” 1956, p. 35), presigis artikolon pri Esperanto de Derrick Faux, en kiu la aŭtoro ne nur pritraktis la rezultojn atingitajn per la internacia lingvo, sed ankaŭ avertis ke „kvankam komuna lingvo ebligas al la homoj interkompreniĝi, ĝi ankaŭ ebligas, ke ili pli facile kverelu pri siaj malkonsentoj kaj kontraŭstarantaj ideologioj”. Saĝa vortol!

Al ĉiuj junulaj grupoj, al ĉiuj gejunuloj, partoprenontaj la Tutmondan Festivalon Junularan en Moskvo, en 1957

Karaj geamikoj!

Preparante sin por la VI Tutmonda Junulara Festivalo en Moskvo, en 1957, leningrada junularo organizis amatoran koncertan ansamblon. La ansamblon partoprenas pli ol 100 gejunuloj: muzikistoj, kantistoj, dancistoj, legistoj, artifikistoj, jonglistoj, pup-direktantoj k.a. — reprezentantoj de la plej diversaj artspecoj, kaj ankaŭ amatoroj — komponistoj, poetoj, dramaŭtoroj, pentristoj.

Ni, ansamblanoj, junuloj kaj junulinoj-laboristoj, oficistoj, studentoj, senprofite fordonas al arto nian amon, kapablojn, tutan liberan tempon. Ni estas preparantaj por la festivalo grandan koncert-revuon, kiu, ni esperas, plaĉos al Vi.

Ni proponas: ni interkonatiĝu kun Vi antaŭ la Festivalo kaj ni renkontiĝu en Moskvo, en 1957, jam kiel bonaj konatuloj.

Ni proponas komenci kolektivajn kaj individuajn korespondadon kun Vi, niaj eksterlandaj geamikoj.

Ni proponas interŝanĝadon de kantoj, amataj de junularo ĉiulanda, de muzikaĵoj por orkestro, de dancmuzikaĵoj, fotoj de amatoraj artaj junulgrupoj, afiŝoj, programoj ktp.

La sperto de pasintaj festivaloj montris, ke iliaj partoprenantoj estas dividitaj per barilo de diverslingveco. Dekmiloj da gejunuloj, alveturantaj festivalon el dekoj da landoj pro lingvonescio estas devigataj limiĝi sin nur je amikecaj rigardoj kaj fortaj manpremoj. Sed tio ja ne sufiĉas! Kiel dezirinde estus interparoladi, ekscii novaĵojn el la vivo de junularo de diversaj landoj kaj ankaŭ mem rakontadi.

Dum la lasta festivalo estis pli ol cent delegitoj el kelkdekoj da landoj, kiuj libere interparoladis kun helpo de internacia lingvo Esperanto.

Ni decidis ekposedi antaŭ la Festivalo tiun ĉi facilan lingvon, ellerneblan dum la plej mallonga tempospaco, por ke ni povu libere interrilati kun ĉiuj el Vi, kiuj ankaŭ posedos ĉi lingvon. Ni alvokas Vin sekvi nian ekzemplon. Ni anstataŭu „la lingvon” de gestoj kaj ridetoj per vera, efika parolado, ni disbatu la muron de diverslingveco, dividanta nin! Ni atendas, geamikoj, Viajn respondojn je nia alvoko!

Vivu amikeco kaj solidareco de la junularo tutmonda!
Skribu tuj kaj bonvolu sendadi al ni ankaŭ ĉiujn eldonaĵojn, kiuj enpresos ĉi tiun nian alvokon. Nia adreso estas: Leningrado — 22, Kirovskij prosp., 42, Domo de Kulturo de industri — produktada Kooperero. Al la Junulara ansamblo.

Leningrada Junulara Ansamblo.



Dum fama internacia film-festivalo en banejo KARLOVY VARY (Ĉeĥoslavakio), lokaj esperantistoj renkontiĝis kun dana ĵurnalisto s-ano BORGE TROLLE. Supre ni vidas s-anon Trolle (Portugalsgade 7 B, København S, Danujo), maldekstre, kun loka prezidanto de la esperantista rondo s-ano VLAD. HORÁK, antaŭ festivala kinejo (grandhotelo Moskva). El Karlovy Vary s-ano Trolle forveturis al Polujo, kie li renkontiĝis kun polaj samideanoj.

TELEGRAMA INFORMO

En la kunsido de la Komisiono por Kulturaj Demandoj de la Eŭropa Konsilantaro, okazinta en septembro en Oslo, la propono pri Esperanto estis denove traktata. Denove la voĉoj egalas: 6 por kaj 6 kontraŭ. La demando estas denove prokrastita.

Romo Aprobas Esperantan propagandon

La 11an-2-1955, la Sankta Patro proponis la fondiĝon de la „Papa Asocio de la Religiaj Vokacioj“ („Oeuvre Pontificale des Vocations Religieuses.“) Tiu Asocio jam tiom progresis, ke ni ricevis ĉirkuleron de Kardinalo Valerio Valeri, prefekto de la Kongregacio de Religiuloj en kiu li petas la kunlaboron de ĉiuj Institutoj kaj la alsendon de ĉiu propaganda materialo.

Kompreneble mi tuj sendis la Esperantajn Prospektojn pri nia Kongregacio, akcentante ke per la Lingvo Internacia, mi faras propagandon sur tereno internacia. Ĉiujare mi devos sendi detalan raporton pri tiu propagando al la Sta Seĝo; tial mi esperas ke ĉiuj Samideanoj helpos min, petante informojn aŭ skribante al la Estro por esprimi sian interesiĝon pri nia laboro.

Responde al mia skribaĵo venis la ĝojiga respondo:

Dal Vatikano 3 Marto 1956.

Tre Estimata Frato,

Mi estas feliĉa sciigi al vi ke la Sta Patro, sentis sin tre tuŝita pro viaj afablaj vortoj, kaj pro via Internacia propa-

ganda materialo kiun vi sendis en via lasta letero.

Kiel apreza signo pri tio, la Sta Patro ŝarĝas min transdoni al vi Lian dankon, kaj elkore Li donas al vi kaj al ĉiuj membroj de via Instituto la favoron de la Apostola Beno.

Akceptu tre Estimata Frato, la certigon pri mia religia sindono.

A. Dell'Aqua, Subst.

Mi konscias pri la graveco de tiu aprobo, kiu venas el plej alta religia instanco, kaj montras ke en tiuj medioj oni favoras nian Lingvon.

Adreso por inform-petantoj:

Frato Arni Decorte

Stropstr. 127,

Gent. Belgujo.

(La Kongregacio de la Fratoj de la Karilato, adreso supre, eldonis belegajn Karitato, adreso supre, eldonis belegajn informajn prospektojn esperantajn pri sia Instituto.)

JUBILEOJ

Dum septembro-oktobro de la jaro 1906, s-ano Americo Ludviko Reni ekkonis Esperanton: post parolado de prof. Henriko D'Aulerio en Milano li enskribiĝis al kurso gvidata de tiu instruisto. Tiam li estis 26-jara. Ekde majo 1907 li transloĝiĝis al Verona, kaj tie li vivadis kaj fariĝis kunfondanto de la unua tiea grupo. De 1912 li estas Delegito de UEA en Verona, de 1914 membro de la Itala Katedro de Esperanto. En la jaroj 1922 kaj 1923 li estis Administra Sekretario de la Centra Komitato de Itala Esperanto Federacio, kaj de 1946 li estas Sekretario de Itala Katolika Esperanto-Unio, kaj reprezentanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Al la plejaĝa esperantisto en Verona ni esprimas

koran gratulon, kaj deziras al li multjaran pluan laboron por nia afero!

* * *

Fervora samideano S-ro František BUHR, kiu loĝas en Praha-Brevnov, Belohorská 514, Ĉeĥoslovakio, atingis la 30-an de aŭgusto 1956 la sesdekan jaron de sia vivo. Li esperantistiĝis en la jaro 1922. La sekvantan jaron li fondis Esperanto-fakon de katolika societo, kiu



poste transformiĝis al Ligo de katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovaka Respubliko. Dum ĝia daŭro li estis ĝia sekretario, kiu dediĉis siajn diligentajn laborojn kaj ĉiun liberan tempon kun modela oferemo al disvastiĝo de la internacia helpa lingvo Esperanto. Li partoprenis je diversaj universalaj kaj katolikaj internaciaj Esperanto-kongresoj kaj lia tipa nacia kostumo plibeligis multajn fotografiojn de kongresanoj. Al nia kara jubileo ni deziras firman sanon kaj veran ĝojon pro la laboro, dediĉita al la nobla idealo de interfratiĝo de homoj pere de Esperanto. Dio donu al li ankoraŭ multajn jarojn por plua fruktodona laboro! K.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956

Stato je la 31-a de aŭg.

★

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Jugoslavio	2629	3533	134,39
2.	Italujo	3025	3370	111,40
3.	Svislando	1740	1885	108,33
4.	Hispanujo	1825	1845	101,10
5.	Svedujo	6893	6710	97,35
6.	Francujo	5869	5680	96,78
7.	Nederlando	5074	4894	96,45
8.	Britujo	7608	7235	95,10
9.	Finnlando	2872	2685	93,49
10.	Belgujo	2135	1895	88,76
11.	Brazilo	6820	5370	78,74
12.	Usono	3352	2343	69,90
13.	Danlando	2765	1820	65,82
14.	Norvegujo	2318	1405	60,61
15.	Germanujo	6986	4030	57,69

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Kanado	345	500	144,93
2.	Islando	330	385	116,67
3.	Portugalujo	495	570	115,15
4.	Maroko	937	1061	113,23
5.	Japanujo	1182	1210	102,37
6.	Urugvajo	330	315	95,45
7.	Aŭstralio	1145	1025	89,52
8.	Izraelo	330	290	87,88
9.	Nov-Zelando	854	745	87,24
10.	Sudafriko	305	210	68,85
11.	Aŭstrujo	1485	985	66,33
12.	Meksikio	250	120	48,—
13.	Irlando	250	55	22,—

PARTOPRENANTAJ LANDOJ ATENTU!

Partoprenantaj landoj atentul!

La Estraro decidis disponigi al la gajninta lando en ambaŭ Konkursoj librodonacon en valoro de 100.— n. gld. laŭplaĉe utilgeblan por donacoj, vendado, lotumado ktp. Do, oni konkursu kun nova energio!

Sveda Somera Semajno



Frostavallen

S.S.S. okazis ĉijare de 29-7 ĝis 4-8, denove laŭ invito de Sveda UNESKO-Konsilantaro, Sveda Instituto por Kultura Interŝanĝo kun eksterlando kaj Sveda Esperanto-Instituto. La prelegtemaro traktis la ĉefajn obstaklojn al internacia kompreniĝo kaj kooperado, laŭ jena disdivido:

Prof. Waringhien montris en tri prelegoj, kiun rolon ludas kaj karakteron havas inter tiuj obstakloj ĝuste la lingvaj obstakloj; Docento S. Pragano traktis en tri prelegoj tiun obstaklon, kiun reprezentas la instruado de historio kaj ĝia neobjektiveco en diversaj landoj; D-ro Stöp-Bowitz donis en tri prelegoj klaran elmontron pri la estiĝo kaj evoluo de tiu obstaklo kaj ege aktualaj problemoj, kiu estas la rasa problemoj kaj ĝiaj antaŭjuĝoj; Prof. D-ro Ivo Lapenna traktis en tri prelegoj la laboron de UNESKO por atingi la forigon de tiuj ĉi obstakloj.

Tiuj tri serioj de prelegoj pri tri ĉefaj specoj de obstakloj kaj la kvara, kiu montris la metodojn por forigi ilin, tiel bone elektitaj, science pripensitaj kaj logike kunmetitaj, formis tre unuecan tuton kaj estis plene en la kadro de niaj rilatoj al UNESKO, kiuj ja morale devigas nin diskonigi la laborojn de UNESKO kaj kontribui al ĝiaj celoj.

Sed estis pli. Krom al mondaj problemoj, kiuj nuntempe okupas tiun plej altan internacian instancon kulture, parto de tiu ĉi programo estis dediĉita ankaŭ al la internaj taskoj de la Esperanto-Movado. Kvar posttagmezoj estis rezervitaj por fundaj diskutoj pri diversaj aktivecoj.

Diskuton pri Informado enkondukis

Prof. Lapenna, gvidanto de la Informa Fako de UEA, surbaze de tezaro antaŭe disdonita al la ĉeestantoj. Diskuton pri Esperanto-instruado enkondukis Doc. Pragano, multjara Cseh-instruisto kaj docento de Esperanto en la Amsterdama Universitato. Diskuton pri la praktika utiligo de Esperanto, precipe pri la organizaj demandoj ligitaj al tio, gvidis D-ro Stöp-Bowitz, prezidanto de la Norvega Esperanto-Ligo. Diskuton pri la praktika utiligo precipe sur kultura kampo enkondukis kaj gvidis S-ro J. Strönnne, prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio kaj organizinto de S.S.S.

Al la programo estis krome aldonita grava prelego de Doc. Pragano pri kelkaj eroj el la plej nova Esperanto-literaturo, filmoj kaj kompreneble, pluraj distraĵoj.

Entute, la programo estis tiel riĉa, la prelegoj tiel altnivelaj, la interŝanĝadoj de pensoj kaj opinioj tiel fruktodonaj kaj inspiraj, ke la tuta semajno fariĝis perlo inter la kulturaj aranĝoj okazintaj en kaj per Esperanto iam ajn.

Neeblas ĉi tie rerakonti la enhavon de la prelegoj. La prelegantoj ĉiuj estis aparte kompetentaj pri sia temo, ilia reputacio de perfektaj esperantistoj kaj interesaj prelegistoj konata en la tuta Esperanto-mondo. La prelegoj estis surbendigataj kaj ni povas nur esperi, ke estos troveblaj la monrimedoj por eldoni ilin en formo de broŝuro. Ili centprocente meritas tion.

Neeblas ankaŭ ĉi tie eniri en la diversajn diskutojn, dum kiuj estis interŝanĝitaj la pensoj de 80 homoj el 14 nacioj en larĝaj diskutoj neniam eblaj dum grandaj kongresoj. Sed ni ne dubas ke pluraj partoprenintoj reveninte en siaj propraj esperantistaj medioj, kapablis kaj

kapablos injekti sian lokan aŭ landan movadon per amaso da novaj ideoj.

Se devas aŭdiĝi kritiko, ĝi direktos sin al la esperantista publiko, ne al tiu kiu ĉeestis, sed al tiu kiu ne ĉeestis. La celo de tiu ĉi semajno estis, kolekti esperantistan eliton, precipe la gvidantojn de monda, landa, loka kaj specialigitaj organizaĵoj, por per komuna studado de la problemoj veni al konkretaj konkludoj rilate la labormetodojn kaj planojn en la venontaj jaroj. Estis la forta espero de la organizantoj, ke la respondecaj instancoj de la movado sendu tien siajn reprezentantojn kaj raportantojn. Tion — kun kelkaj esceptoj — ili ne faris kaj ili maltrafis unikan ŝancon. Por tamen atingi la necesan nombron da partoprenantoj kaj ne finance fiaskigi la aranĝon, la organizantoj fine akceptis ĉiujn ajn partoprenantojn, tiel ke inter 80 personoj nur proks. 30 apartenis al la esperantista gvidantaro. Kompreneble, ankaŭ la aliaj esperantistoj, ne ludantaj specialan rolon en la movado, ĝuis tiun ĉi semajnon kaj riĉiĝis siajn sciojn, sed inter ili estis ankaŭ kelkaj, cetere tre simpatiaj geamikoj, kiuj vizitis la prelegejon nur ĉar la vetero ne estis tro bela. Vidu, por ili ne estis tiu ĉi aranĝo, ĉar ili ne sciis taksii ĝian valoron kaj unikecon. Sur iliaj lokoj en la prelegejo devus sidi estraranoj de kluboj kaj landaj asocioj, gvidantoj de informaj fakoj kaj kulturaj sekcioj...

En la unuaj dek jaroj de nia jarcento ĉie en la mondo la Esperanto-Movado organiziĝis. Sekve de tio ni nun travivas epidemion de oraj jubileo, diversmaniere festataj laŭ la karaktero de la popolo kaj la eblecoj de la loko aŭ lando. Kelkfoje oni havas la bonan ideon eldoni esperantan verkon honore al la jubileo, sed tre ofte oni nur agrable festas inter si sen tre granda konscio pri la graveco de la festata fakto. Tiaj festoj tamen estas multekostaj kaj oni povus demandi sin, ĉu jubileanta organizaĵo ne farus pli grandan servon al si mem kaj al la movado, se ĝi sendus seriozan reprezentanton al tia Altlernejo de la Esperanto-Movado kia estas S.S.S., kun la konkreta tasko detale raporti pri la akirita scio kaj eĉ poste fari pri ĝi prelegojn aŭ kurson. Tio — je konsidero de jubileontoj... kaj aliaj... M. H. V.

Antaŭkongresa aranĝo

estis la internaciaj feraj E-kursoj en Helsingør, kiuj okazis 28/7-4/8 sub aŭspicio de UEA. Jam du monatojn antaŭ la komenciĝo ĉiuj lokoj en la altlernejo estis menditaj, tiel ke preskaŭ 40 vane klopodis aliĝi.

Ĉeestis proks. 230 personoj el 15 landoj, i.a. Vietnamo, Aŭstralio kaj Grekujo. Karavanoj venis el Islando, Nederlando kaj el Britujo.

Bonegajn prelegojn kaj instrulaboron faris en siaj diversaj kursoj f-ino Ida

Christensen, s-ino Zacho, f-ino Noll, s-roj Rosbach, Morariu kaj Søgaard.

Posttagmeze okazis bonegaj ekskursoj al la loka kastelo Kronborg, la kastelo de Hamleto, al aliaj proksimaj kasteloj Fredensborg kaj Frederiksborg. Ankaŭ al sveda urbo Helsingborg, ĝemela urbo de Helsingør, ni ekskursis, kie lokaj gesamideanoj sub gvido de s-ro Lundgren aranĝis bonegan tagon por ni.

En la finfesto gvidis f-ino Ida Christensen la programon, kiu fariĝis tre varia kaj ege vigla, ĉar granda parto de la kursanoj partoprenis. Emocia estis la disiĝo en la posta tago, kaj multaj dankvortoj estis esprimataj al la kursaranĝa komitato.

L. FRIIS.

Postkongreso en Malmö

Sammomente kiam UK Kopenhago fermis la ĝicetojn, la frata klubo en Malmö, Svedujo, malfermis sian oficejon ĉe la alia flanko de la markolo Öresund. La Postkongreso en Malmö estis fakto.

La plimulto loĝis en la sama domo, kie oni kolektiĝis en la sabata vespero por ĝui kabaredan prezentadon. 225 partoprenantoj el 20 diversaj nacioj plenigis la teatran salonon, kiam post salutparolado de la prezidanto s-ro P. Törnégren la programanoncanto s-ro J. Strönné prezentis la kantistinon L. Lundborg kaj la geaktorojn Ester kaj Helge André. S-roj Bergman kaj Bergström bonege ludis saksofonon kaj segilon. Ĉiuj kantis sub gvido de s-ro Erik Andersson, kaj s-ro Flego el Parizo brave plenumis sian parton. Sekvis agrabla kunestado, danco, te-supeo.

Dimanĉon la 12-an de aŭgusto rondveturado tra la urbo. La unuan fojon la urbo mem ion eldonis en Esperanto, nome informilon por la urba karto, kiun ĉiuj ricevis dum la aŭtobusveturado. Haltoj ĉe la Ūrba Teatro, la parkoj kaj kompreneble ĉe la bela Studhejmo de la klubo en Malmö. La eksterlandanoj sopiris tien, kaj posttagmeze ili kolektiĝis en la Studhejmo por tie ĝui kelkajn horojn ĉe taso da kafo. Entute agrablaj tagoj kaj bona punkto post la 41a UK.

P-into.



„Ĉiu sentis sin feliĉa en harmonia solidareco“. Dua internacia kurso pri Esperanto kaj Geonismo.

Somera Tendaro en ĈSR

Hura al la 41-a U.K.

15/7-11/8 plensukcese efektiviĝis en Ĉeĥoslovakio la V-a Somera Esperantista Tendaro de la junularo /SET/ zorge de la Esperanto-Fako de Domo de Kulturo en Opava. SET estas la unua tiuspeca edukejo en la mondo. 90 partoprenantoj studis Esperanton kaj ĝiajn literaturon kaj historion en kvar laŭgradaj kursoj por fine subiĝi al ekzameno. Pri la nivelo de la kursoj atestas ekz., ke la studmaterialo pri literaturo kaj historio estis multe pli ampleksa ol tiu de la ŝtataj ekzamenoj pri Esperanto. Ĉeestis ankaŭ la hungara Esperanta-junularestro I. Ferenczy kaj juna instruisto nederlanda H. Saalting. Asistanto de teknika altlernejo en Stockholm, G. Nilsson, kiu vizitis SET por semajno, skribis al la gvidantaro: „Mi eĉ ne sciis antaŭe imagi, ke viaj kursoj havas tiel altan nivelon. Mi klopdos sendi al vi laŭvice miajn infanojn, ĉar laŭ la eduka flanko via tendaro havas multe pli grandan valoron ol multaj oficialaj lernejoj ĉe ni“.

La tendaro en profundaj arbaroj konsistis el 22 litotendoj kaj krom kutimaj aferoj ĝi posedis ankaŭ volibalejon, riverbanejon, telefonon, bibliotekon. La ferovo donis 50% rabaton.

Kvankam fore de la cetera mondo, la tendaranoj estis spirite ligataj kun la tutmonda movado, pri kiu ili tiel multe lernis. Dum la solena momento en Kopen-

hago ĉiuj tendaranoj viciĝis ĉirkaŭ la flagomasto kaj tondra saluto disehis inter la deklivoj de la rivervalo: „Al la 41-a Universala Kongreso de Esperanto, nun malfermata en Kopenhago, hura, hura, hura!“

SET estis ofte vizitata de aliaj junularaj tendaroj kaj okazis kulturprogramaj konkursoj inter ambaŭ partioj, ĉirkaŭ la tendara fajro. La vizitantoj eĉ ellernis Esperantajn kantojn. Radio Ostrava raportis pri la okazintaĵo. Cetero la hungara ĵurnalo Szabad Nép menciis pri SET sur 1-a paĝo.

Jen nova, alloga maniero por interesiĝi la junularon pri Esperanto. Rekomendinda ankaŭ en aliaj landoj. SET eĉ devis rifuzi plurajn partoprenantojn.

Norvega Esperantista Ligo

okazigis sian jarkunvenon en Oslo la 12an de Aŭgusto por ebligi al laŭeble multaj membroj el malproksimaj lokoj partopreni survoje hejmen post la kongreso en Kopenhago.

La jarraporto kaj jarbilanco pri 1955 montris ke la Ligo progresis dum la pasinta jaro, sed ne tiom, kiom oni povus deziri. Malgranda aldono al la statuto estis unuanime aprokata, kaj oni transiris al la elektoj, kiuj plejparte rezultigis reelektojn. La nuna estraro konsistas el: prezidanto C. Støp-Bowitz, vicprezidanto Olav Rygg, ĝenerala sekretario John Selbekk, sekretario Jan Ekhaugen, kasiso Karl Ekhaugen, estraranoj Alfred Skyberg, Einar Gustavsen, Ragnv. Rian, Georg Rokkan, Olav Thormodsen, Komitatano de U.E.A. restas R. Bugge-Paulsen. Post la elektoj sekvis vigla diskutado pri la kursagado kaj propagando. Oni decidis ekde la nuna aŭtuno komenci eksperimentojn per pli longedaŭraj kursoj kun eksterlanda Cseh-metoda instruisto, kaj ankaŭ cetero aperis dum la diskutado pluraj bonaj ideoj.

La kunveno finiĝis per bela festeno, en kiu partoprenis ankaŭ gastoj el 5 nacioj. Dum la festeno la ordeno de N.E.L., Pro Merito, estis donata al 3 membroj: C. Støp-Bowitz fariĝis oficiro de la 1-a grado, Enevald Mårli kaj Alfred Skyberg kavaliroj de la 2a grado.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por ondlongoj kaj horoj de la dissendoj, vidu la septembran nron p. 144.

Radio Roma — Prelegas merkrede S-ro Luigi Minnaja, vendrede Prof. D-ro Vincenzo Musella.

3 X, Mondo Esperantista; 5.X, La unua franciskano „Santa Chiara“ el Assisi; 10.X, Novajoj el Italujo; 12.X, Cristoforo Colombo; 17.X, Nia gazeto; 19.X, La „Thermæ de Caracalla“ en Romo; 24.X, De Romo al Venecio; 26.X, Muzika vojirado tra regiono „Marche“; 31.X, El la itala poezio: Giuseppe Parini.

Radio Ljubljana sciigas la posedantojn de taŭgaj radioreciviloj, ke ĝia programo estas ankaŭ dissendita per „ultrakurtaj“ ondoj: 94.1 Mc/s. 92.9 Mc/s. 87.7 Mc/s, tio estas 3.18, 3.22, 3.42 metroj.

Sat Kongreso en Beograd

La 29-a SAT kongreso la unuan fojon estis organizita sur la balkana duon-insulo en la ĉefurbo de Jugoslavio, Beograd. La kongreson vizitis proksimume 650 gekongresanoj, la partopreno de la jugoslavaj SAT-anoj kaj aliaj esperantistoj estis granda.

Fine de julio ĉijare en Beogrado regis bela, varma, somera vetero kiam la kongresanoj alveturadis. La atendado estis parte tre bone organizita, parte ne. Kelkaj trajnoj estis per laŭparolilo esperantlingve bonvenigitaj, aliajn neniu atendis kaj la unuan kongresan tagon, dum kelkaj matenhoroj la akceptejoj en la ĉefstacidomo estis fermita. La organizo de ĉiu kongreso estas tre grava, sed de tiu speciale, ĉar la eksterlandaj esperantistoj, estis en Beogrado „analfabetoj“, kiel ili mem diris, ne sciinte legi kirilajn literojn, per kiuj estas skribitaj ĉiuj surskriboj en tiu urbo.

La kongresejo estis tre konvena domo de la popol-universitato „Kolarĉev“, en la centro de la urbo. La solena malfermo komenciĝis per la nacilingva (tradukita) parolado de s-ro Gjuro Salaj, la prezidanto de la sindikata unuiĝo en Jugoslavio kaj la honora protektanto de la Kongreso. Flanke de SAT-estraro partoprenis k-do Bartelmes. Inter la salutintoj estis ankaŭ reprezentantoj de la ĉeĥaj, bulgaraj kaj hungaraj esperantistoj.

Honore al la kongreso SAT eldonis gravajn verkojn de Voltaire, en unu volumo „Kandid, Zadig kaj Senartifikulo“. La agema kongresa komitato sub la gvidado de Branko Maksimoviĉ havigis ankaŭ okazan kongresan poŝtstampilon kaj la poŝtkartojn. La informado pere de naktaj gazetoj kaj radio estis bona, ĉiutage aperis nacilingvaj artikoloj kaj fotoj de la kongresaj aranĝoj en la ĉefaj tag-jurnaloj kaj la vespera gazeto „Večernje novosti“ ĉiutage aperigadis artikolojn ankaŭ esperantlingvaj.

La kulturaj aranĝoj estis abundaj, laŭ la jugoslavia kongres-aranĝa kutimo.

La interkona vespero okazis sur la belega malnova fortikaĵo „Kalimegdan“. Pro la tro malfrue ricevita subvencio, la preparkomitato ne povis farigi sufiĉe da flagoj kaj la vojo al Kalimegdan ne estis markita, pro tio kelkaj grupoj ne sukcesis trovi la lokon.

En la kultur-domo de la okcidenta urboparto estis prezentita la 3-akta komedio „Suspektinda persono“ de la plej fama serba komedioverkisto Branislav Nuŝiĉ, tradukis Antonije Sekelj. La sama komedio rikoltas ĝuste nun grandajn sukcesojn en Sovetunio. Aktoris membroj de la kultur-artista societo „Abraŝevič“, kiuj antaŭ du monatoj komencis lerni Esperanton studinte la dramon tekston. Spite al tiu fakto la prezentaĵo estis tre bona, tre lerte surscenigita de la profesia reĝisoro. Tiu komedio riĉigis la esperantan literaturon per unu distre-karakterata, kvallita drama verko, ĵus presata.

Al la eksterlandaj kongresanoj, precipe plaĉis la vespero de jugoslavaj popol-kantoj kaj dancoj, kiujn prezentis la membraro de la kultur-artista societo „Branko

Cvetkoviĉ“, vestitaj en belegaj, riĉkoloraj naciaj kostumoj.

Okazis ankaŭ du ekskursoj, kiuj bone sukcesis.

En kadro de la Laborista universitato prelegis Jugoslavio, Ĉeĥo kaj Franco.

La labora parto de la Kongreso kontentigis la SAT-anojn, kiuj diligente vizitis ĉiujn fak-kaj frakcikunvenojn. La kongreso eldonis rezolucion, en kiu estas substrekita graveco de SAT-movado por esperantistoj-laboristoj.

Santempe okazis la tria infan-kongreseto, kiun partoprenis ĉirkau 50 infanoj esperantistaj el Jugoslavio kaj eksterlando.

Laŭ la decido, la venontjara Kongreso okazos en Roterdamo.

Emilija Lapenna

Kelkaj klarigoj responde al cirkulero de D-ro Solzbacher

En la jaro 1953 mi devis doni al d-ro Solzbacher kelkajn instruojn pri Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO. Nun venis en miajn manojn lia letero de la 15-a de julio 1956, kiun li skribis al s-ro E. Malmgren kaj poste dissendis aŭ dissendigis — ne multe gravas — kiel multobligitan presajon al diversaj adresoj, eble al ĉiuj, laŭ la Jarlibro, kun la escepto, verŝajne tute natura el lia vidpunkto, de mi mem. Tiu vasta diskonigo montras, ke li atribuas grandan valoron, eble eĉ sciencon aŭ literaturan, al sia produkto. Tial mi denove sentas min devigita doni al li respondon kaj al la legantoj kelkajn klarigojn. Nur pri tiuj punktoj, kompreneble, kiuj efektive havas ian gravecon el vidpunkto de la Movado, kio tamen ne signifas, ke la aliaj estas malpli absurdaj.

1) *Pri la t.n. Molotov-telegramo:* Mi jam detale informis en la artikolo „Instruoj el Eraro“, publikigita en la maja numero de „Esperanto“ 1956, la cirkonstancojn pro kiuj ekestis la eraro pri la uzo de Esperanto en la telegramo de Molotov. Tiun numeron de la oficiala organo de UEA d-ro Solzbacher evidente jam estis ricevinta kaj leginta la 15-an de julio. Se li tion ne faris, estas lia kulpo, pro kiu li mem portas plenan respondecon. Kvankam mi pli ol klare diris, ke la „vereco“ de la informo el „Sunday Times“, publikigita tuj poste en multaj aliaj gazetoj kaj disaŭdigita de pluraj radio-stacioj, estis konfirmita el Tokio al la londona korespondanto de „American Broadcasting Company“, tamen d-ro Solzbacher plue asertas, ke „tiu konfirmo ŝajnas esti tre duba afero“ kaj, ekspluatante la eblan neinformitecon de almenaŭ kelkaj ricevintoj de la cirkulero, naive-ruze demandas: „Kiu ricevis ĝin? Ĉu Lapenna?“

D-ro Solzbacher riproĉas, ke mi uzis la vorton „sensacia“ por tiu informo kaj sugestas kvazaŭ mi mem estus elpensinta la tutan aferon: „La mispropagando pri la Molotov-telegramo kaŭzis al ni malfacilaĵojn“, li skribis. Nu, se la telegramo fakte estus sendita en Esperanto, ĝi

estus ja sensacia. Tiel komprenis la aferon centoj da redaktoroj, eĉ de la plej seriozaj gazetoj, kaj ĝuste tial ili publikigis informojn aŭ tutajn artikolojn pri ĝi, ne malofte kun vere mispropaganda karaktero. Precize tial, nome por mallebliĝi la mispropagandajn efikojn, mi verkis kaj kun la aprobo de la Estraro sendis mian artikolon al la informaj fakoj de la landaj asocioj (en Usono al EANA), kiuj rajtis — superflue tion diri — utiliĝi ĝin aŭ ne laŭ la cirkonstancoj. Mi konstatas, ke en neniu usona gazeto aperis tiu artikolo. Ĝi nur estis komplete misprezentita kaj tial misuzita en „Amerika Esperantisto“ kaj nun ankaŭ en la cirkulero de d-ro Solzbacher. Pri la karaktero de tiu artikolo, kiu aperis ankaŭ en la februara numero de „La Praktiko“, ĉiu povas mem konvinkiĝi. Sed kiamaniere tiu artikolo, eĉ se ĝi fakte estus netaŭga aŭ malbona laŭ la enhavo, povis en kiu ajn senco „kaŭzi malfacilaĵojn“ en Usono, kie ĝi ne estas publikigita, restas enigmo, kiun eĉ la akrobataĵoj de d-ro Solzbacher ne sukcesas solvi. Tio, kio efektive kaŭzas malfacilaĵojn en Usono, estas la kalumnioj kaj mensogoj, kiujn „Amerika Esperantisto“ konscie dissemas ne nur inter la esperantistoj, sed ankaŭ inter la neesperantistoj, eĉ ĉe la aŭtoritatoj, rilate UEA kaj ĝiajn funkciojn, por kio d-ro Solzbacher kiel unu el la kunredaktoroj de tiu gazeto, portanta pro nekonataj kaŭzoj en sia titolo ankoraŭ la vorton „esperantisto“, plene respondecas. Kiam tiuj absurdaj pro la senĉesa malica ripetado komencas esti akceptataj kiel verŝajnaj aŭ eĉ nur eblaj almenaŭ en iuj usonaj medioj (la kalumniantoj ĉiam kalkulas, ke la neinformitaj personoj reagos en tiaj kazoj laŭ tiaj saĝaj diroj, aŭditaj iam en elementaj lernejoj, kia estas, ekzemple, la proverbo, ke kie estas fumo estas ankaŭ fajro k.s.l.), tiam la samaj laŭcintoj de la kalumnia aserto prezentas ĝian disfamiĝon kiel „pruvon“ pri ĝia „vereco“! Kaj se la kalumniito post tuta aro da tiaj atakoj provas sin defendi en la intereso de la plej elementa vero, tiam d-ro Solzbacher tion nomas „nerespondeca enmiksiĝo en usonajn aferojn“. Vere, pli da hipokriteco oni malfacile povas imagi!

2) *Pri diplomatio kaj oficialeco:* Supozante, ke la telegramo fakte estis verkita en Esperanto, mi skribis, ke tiu fakto „havas eksterordinaran signifon“. D-ro Solzbacher diras: „Kia sensencaĵo! Ĉiu Ministerio de Eksterlandaj Aferoj elsendas milojn da telegramoj ĉiutage, kaj la ministro plej ofte scias nek la enhavon nek la lingvon, en kiu ili estas redaktitaj.“

Do, laŭ d-ro Solzbacher, la lingvo uzata en interŝtataj rilatoj tute ne havas signifon. Laŭ li, s-ro Dulles, aŭ kiu ajn ministro pri eksterlandaj aferoj povus glate sendi telegramon ankaŭ en Esperanto kaj tio havus nenian gravecon. Kia profunda saĝo! Kial, do, mi petas, la Ministerioj ne sendas amase esperantlingvajn telegramojn? Kial, do, okazas

tiu grandega lukto por oficialigo de la naciaj lingvoj en interŝtataj organizaĵoj? Kial, do, pluraj delegacioj, inter kiuj ankaŭ la usona, havis tiel insiste negativan starpunkton rilate Esperanton en Montevideo? Kial, finfine, ni esperantistoj faras tiel grandegajn oferojn por antaŭigi la uzon de neŭtrala lingvo en internaciaj rilatoj? La diro de d-ro Solzbacher montras, ke li ne nur ne komprenas la grandegan signifon, kiun havas la uzado de tiu aŭ alia lingvo en la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj, sed ke li havas, tre surprize, eĉ ne ideeton pri tio. Se li mem ne havis ĝis nun la tempon pli profunde studi la demandon, li povis almenaŭ pli atente tralegi la artikolon de Viator en „Sunday Times”, en kiu li facile trovas: „but what was extraordinary was the fact that the reply was in English and Esperanto” („Sed kio estis eksterordinara, estis la fakto, ke la respondo estis en la angla kaj en Esperanto”). Mi substrekis la vorton *eksterordinara*, por ke d-ro Solzbacher povu vidi ĝin pli bone. Precize tiel same komprenis la novajon ĉiuj, kiuj ĝin aŭdis. Vere, kia sensencaĵo en la „kia sensencaĵo” de d-ro Solzbacher.

Post tiu epokfaranta koncepto pri la rolo de la lingvo en la interŝtataj rilatoj, ne estas surprizaj liaj ideoj pri diplomatio kaj oficialeco. Li konsentas kun „Amerika Esperantisto”, ke tiu jam enuiga telegramo estis nek „oficiala” nek apartenas al „diplomatio” kaj aprobe citas: „Doktoro de internacia juro devus scii la signifon de la vortoj ‚diplomatio’ kaj ‚oficiala’. Kial trompi la publikon?” Mi lasos flanke la fakton, ke mi doktoriĝis pri juro ĝenerale kaj instruis kiel profesoro (ne doktoro) de Internacia Juro ankaŭ Historion de Diplomatio. Certe ne eblas diskuti kun nekompetentaj nefakuloj pri faka temo. Tial mi nur diros, ke ekzistas multaj bonaj verkoj pri diplomatio kaj ĝia historio (d-ro Solzbacher povas de mi ricevi tiurilate kelkajn konsilojn, se li deziras instruiĝi) kaj ke preskaŭ ĉiu aŭtoro donas alian difinon pri ĝi. Tamen, mi opinias, ke ne ekzistas hodiaŭ unu sola teoriisto aŭ tiu ajn alia persono, almenaŭ iom studinta aŭ leginta pri la afero, kiu povus malkonsenti pri la fundamenta, baza kaj plej ĝenerala nocio, nome ke diplomatio estas instrumento per kiu la ŝtato realigas sian eksterlandan politikon. Tial la telegramo de Molotov, se ĝi estus verkita en la Internacia Lingvo, signifus, ke Esperanto estus „por la unua fojo en la historio de diplomatio” uzita „en oficiala Registara komunikado”. Ne gravas ĉi tie la praveco aŭ malpraveco de la enhavo, nek ĉu tiu telegramo signifas „enmiksiĝon en la internajn aferojn” de alia lando aŭ ne, kiel tion erare opinias d-ro Solzbacher, ĉar ankaŭ tiaj enmiksiĝoj (kiom da eblecoj kaj kiom da interpretadoj!) apartenas bedaŭrinde al faktaj regulaj diplomatiakaj aktivecoj de multaj ŝtatoj, kion mi mem forte kondamnas kaj kiel ordinara homo kaj kiel juristo. Cetere, eĉ la konservativa kaj gravega „Sunday Times”, kiun — mi volonte rekonas — la redaktoroj

de „Amerika Esperantisto” ankoraŭ ne kuraĝis proklami pro tio „komunista”, komentariis tute nature kaj korekte: „This is the first time the Soviet Government has recognised Esperanto as an international language” („Tio ĉi estas la unua fojo, ke la Soveta Registaro rekonis Esperanton kiel internacian lingvon”).

Ne estas honto ne scii ion, sed estas vere impertinente, por esprimi min tre milde, skribadi tiel aplombe kaj superece pri aferoj, kiujn oni ignoras, kaj eĉ nomi „trompo” la sole eblan korektan interpretadon.

3) *Pri la UNESKO-Rezolucio*: D-ro Solzbacher diras, ke la informo, laŭ kiu la Komisiono pri Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj de la Eŭropa Konsilantaro estus unuanime aprobinta la 25-an de januaro la rekomendon pri eksperimenta instruado de Esperanto, estis erara. Li pravas pri la fakto mem, sed li malpravas, kiam li kulpigas min. Mi ne ĉeestis la kunsidon de la Komisiono, sed ricevis en Londono la koncernan informon skribe de s-ro Petit, nia reprezentanto ĉe la Komisiono. Mi mem havis la okazon konstati la fakton staton nur meze de aprilo, kiam en Strasbourg la Sekretariato permesis al mi vidi la protokolon de tiu kunsido. Tamen, mi ne venis nek venas al ideo riproĉi al s-ro Petit, aŭ al la komisiito por tiu afero, d-ro Herrmann, aŭ al kiu ajn alia „mankon de precizeco kaj akurateco”, kiel tion facilanime faras d-ro Solzbacher, ĉar mi komprenas, ke tiaj eraroj povas okazi, precipe se oni ne estas rajtigita persone partopreni la diskuton kaj la decidon.

Multe pli grava estas la misinterpretado de la vortoj „authorizes, authorise” en la Rezolucio de UNESKO de la 10-a de decembro 1954. D-ro Solzbacher asertas, ke la Esperanto-traduko de tiuj vortoj el la franca kaj angla tekstoj („instruicias”) estas malĝusta, ĉar ĝi transformas „permeson en ordonon”. Li diras, ke ankaŭ tio „kaŭzis al ni malfacilaĵojn en nia propagando en Usono.”

Antaŭ ĉio mi diru, ke la vere originala teksto, proponita de la Meksikia delegacio, estis en la hispana kaj ke en ĝi estis uzita la vorto „aconseja” (konsilas), kiu en ĉiu okazo estas pli forta ol „rajtigas”. Sed ni lasu tion kaj ni vidu kian signifon havas la vortoj „authorizes, authorise” en la „lingvo” de UNESKO. Se d-ro Solzbacher estus nur iom familiara kun la afero, li scius ke la direktivoj de la Ĝenerala Konferenco al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, se tiuj direktivoj rilatas la Programon, regule komenciĝas precize per la vortoj „authorizes, authorise”. Oni malfermu kiun ajn paĝon de la libro kun la rezolucioj de UNESKO²⁾ kaj oni facile tion konstatos. Jam la unua el tiuj rezolucioj, publikigita sur la p. 25, komenciĝas per la vortoj: „The Director-General is authorized...” kaj tiel same en unu rezolucio post la alia. Sur la p. 36, kie estas publikigita la Rezolucio pri Esperanto,

troviĝas kvin aliaj rezolucioj kiuj uzas la saman vorton. Ni ne esploru ĉi tie kial la Ĝenerala Konferenco konstante uzas tiun ĝentilan formon por doni instrukciojn al la Ĝenerala Direktoro pri la efektivigota programo, sed mi nur konstatas, ke la vera signifo de tiu vorto en la rezolucioj de UNESKO estas precize „instruicias”. Se la Ĝenerala Direktoro havus la rajton agi laŭ sia plaĉo, do se la rezolucioj ne havus instrukcian karakteron, tiam la rolo de la Ĝenerala Konferenco, kiu ja estas la plej grava organo de UNESKO, estus nula, dum la Ĝenerala Direktoro estus ĉiopova. Kaj tio estus pli ol absurda. En tiu okazo la Ĝenerala Konferenco havus nenian signifon kaj la kelkfoje longegaj diskutoj kaj grandaj luktoj en la Ĝenerala Konferenco absolute nenian sencon. Tial la Esperanta traduko estas laŭ mia opinio korekta. Pri tio d-ro Solzbacher povis informiĝi ĉe mi aŭ kiu ajn specialisto jam antaŭ longa tempo kaj ne atendi preskaŭ du jarojn por krei per sia nescio aŭ neinformiteco superfluan konfuzon inter la esperantistoj. Tamen, eĉ se la Esperanta traduko fakte estus malĝusta, ne estas kompreneble kiamaniere tio povis „kaŭzi malfacilaĵojn” al la propagando en Usono. Finfine, la oficiala teksto en la hispana, franca kaj angla estis diskonigita al ĉiuj kunlaborantoj kaj landaj asocioj, kaj publikigita ankaŭ en la revuo „Esperanto”. Evidente, d-ro Solzbacher povis uzi — eĉ devis uzi — la originalan anglalingvan tekston por la „propagando en Usono”. Sekve, la aserto pri la kvazaŭaj malfacilaĵoj, kiujn kvazaŭe kreis mia kvazaŭe malkorekta traduko, estas nenio alia ol plia malsincereco. Se oni ne povis atingi ĉe sia propra registaro apogon por la Rezolucio; se oni eĉ ne kapablas ekspluati la rezultojn, kiujn la aliaj atingis, do almenaŭ oni ne detruu aŭ malfortigu — ne gravas ĉu pro manko de la necesaj scioj, pro personaj malsimpatioj aŭ pro kiu ajn alia kaŭzo — la pene akiritajn poziciojn. Tio estas la minimumo, kiun oni povas postuli de persono deziranta ankoraŭ sin nomi esperantisto.

Versajne tio ĉi estas la lasta fojo, ke mi respondas al tiaj kaj similaj atakoj, kiuj ĉiam venas de la sama fonto. Mia tempo estas tro limigita kaj mi deziras ĝin utiligi kiel eble plej efike en la efektiva laboro por Esperanto kaj ne perdi eĉ unu plian minuton por defendi min kontraŭ tiaspecaj kalumnioj kaj insultoj. Mi fidus je la saĝo, prudento kaj honesteco de la esperantistaro, kiu certe hodiaŭ scias bone distingii inter objektiva kritiko, volonte akceptata, kaj plej vulgara kampanjo, kiun unuanime kondamnis la Komitato de UEA.

D-ro IVO LAPENNA

¹⁾ Vidu la revuon „Esperanto”, n-roj julio/aŭg. p. 229 kaj septembro p. 226 de la jaro 1953.

²⁾ *Records of the General Conference, Eighth Session, Montevideo 1954, Resolutions.*

Novaj Libro

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

EZOPA SAGO *) *Sepdek-sep* fabloj verse reverkitaj de K. Kalocsay kun 29 satiraj vinjetoj de B. Hamberg. 127 paĝoj 13 x 21 cm, tola bindo. Eldonis Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago. Prezo 5 guldenoj.

Sur la titolpaĝo salutas nin la emblemo de ĉi tiu nova libroserio: koko, kiu krias KKK: KoKeriKi! jen la Komuna Konversacia Klubo kaj ties eldonejo Koko! Simpatia simbolo: la koko ja ion signifas en nia kulturo —

Poeto kaj koko anoncu alvenon de ĉiu aŭroro!

skribis Hohlov. — Kaj jen poeto kaj koko renkontiĝis por signi al ni efektive novan aŭroron: la releviĝon de nia granda bardo el post la nuboj de kelkara kovro. Cetere ĉu ne Kolomano Kalocsay estas mem K.K.? Kiel li mem versis (kun eta modifo) —

*Kaj tial kun fier' de KoKo
mi streĉas mian gorĝon kriĉi,
kriante antaŭ la Sufoko —*

La sufoko de la koko: Kolo-mano, ĉu ne?

Feliĉe tiu sufoko ne okazis. Eĉ malantaŭ la nubkurteno li konstante verkis kaj tradukis poemojn, potence kaj grandprodukte; kaj de tio la nuna eldono estas la unua libroforma rezulto.

Estas interese respuri la genealogion de *Ezopa Sago*. Ja ne al la greka fonto (tion bonege faras la enkonduka poemo kaj la komentario), sed en sencio de nia Esperanta kulturo. Tuj oni pensos pri la *Ezopa Fabelo* de Kalocsay en *Streĉita Kordo*, sed tio estas nur hazarda indiko. La firma vojo estas tiu, kiu retroiras tra la *Cinikaj Sonetoj* de Kalocsay al la *Proverbaro* de Zamenhof: *Ezopa Sago* daŭrigas la laboron pavimi por la esperantistaro tiun vojon de baza popola kulturo. Ĉu vi memoras la *cinikajn sonetojn*? Jen tiu adresita al la homo de l' nuntempo:

*Ho kara samtempo,
vi iom tro rapidis:
naskiĝi vi avidis;
Nu do — je via sano!*

*Ne estas marcipano
la vivo, vi jam vidis:
En brano vi eksidis,
vin manĝas pork' en brano.*

*Sed aŭdu! Nun sonoros
konsolo kvazaŭ tosto:
Ĝismorte ja doloros
mizero, krimo, frosto,
sed la printempo floros
sur — via polva ostol!*

Jen soneto, kies ĉiu verso saltas citinde al la lango, kvazaŭ aforismo aŭ proverbulo. Eĉ, unu Zamenhofa proverbulo estas enstebita: *Sidu en ĥrano, la porkoj vin manĝos*. Kaj ĉu ne alia proverbulo faras kontraston inter *pano* kaj *marcipano*?



Kalocsay (laŭ D. Wranka)

Oni memoras ankaŭ pri la antaŭmilita projekto de Kalocsay, pliampleksigi la *Proverbaron* per popolesprimoj el orientaj kaj aliaj lingvoj. Jes, la patrolinio de *Ezopa Sago* estas klare markita: temas pri klopodo daŭrigi tiun ĉefgravan iniciaton de Zamenhof en la *Proverbaro Esperanta* por grasigi la tro logikan Esperantan konversacion per kolorbildaj interjekcioj, parolturnoj kaj proverboj tiaj, kiajn posedas plej simpla popolano de ĉiu alia lingvo.

La 77 fabloj rakontiĝas flue, per facilnaturaj versoj, kaj estas agrablo kaj ĝuo ilin tralegi. Oni tamen ne supozu, ke estis facile atingi tiun facilecon.

Kalocsay ĉitie plenumas sian propran admonon:

*Do viajn versojn fajlu sen ripozo,
Ĝis ili fluos, kiel bona prozo.*

La fina formo povas trompi pri la atingita peno.

Estas ja karakterizo de la poetoj, kiuj leviĝis inter la du mondmilitoj, ke ili rezignis diversajn stil-licencojn ĝis tiam uzitajn, aplikante sintakson proze-naturan; kaj en tio plej eminente sukcesis Kalocsay. La nuna kolekto denove demonstros tiun lian kapablon.

Ne ĉiam la vers-fabloj liveras al ni proverbulojn aŭ aforismojn (ĉar la aŭtoro pliparte sin detenis gongi la moral-konkludon), sed mi vetas, ke la enhavo kaj trafaj esprimoj de kelkaj fabloj tintos en la memoro kaj fariĝos konversacia valuto de tiu ono de la esperantistaro, kiu sin donos al absorba tralego de ĉi tiu verko. Inter tiuj memorkaptaj eroj mi notas *La flatemara maro*, *Kurioza kulto*, *La prognozo*, *Inter du virinoj* kaj *Kien vi rajdas?* Estas interese, ke en unu fabelo, kiun li verke plivastigis, *La plej granda kulpulo*, troviĝas kiel farĉo la aparta fabelo *Ursa servo*, miasupoze ne *Ezopa* sed rusa, kaj jam (proze) rakontita de Kabe en *Unua Legolibro*. Tion mi aparte rimarkis, ĉar mi mem delonge admiras tiun fabelon, kaj eĉ versigis ĝin sed, feliĉe, en alia maniero, kaj evitis do konkuranton komparon kun la hungara titano...

La versformoj estas virtuoze variaj: jen regulaj, jen pli fluidaj, sed ĉiam regule rimitaj. Nur la enkonduko, kiu rakontas la supozatan vivon de Ezopa, estas en kvinjambaj blankversoj (krom la kelkaj enlokigitaj fabloj, kiuj estas rimitaj), kaj tiu parto nutris mian deantaŭan supozon, ke la blankverso estas la sola poezia formo, kiun Kalocsay ne sukcesis regi: lia rimkonscio eble malhelpas lin trasenti la plastikan ritmon de *Hamleto* kaj *Ifigenio en Taurido* en la Zamenhofa traduko, kaj por mia orelo liaj blankversoj emas soni aŭ kiel kupledoj, en kiuj mankas la rimoj, aŭ kiel prozo iom monotonritma. Ankaŭ Robert Burns fiaskis ĉe blankversoj, kaj ankaŭ li riĉe frandis kaj potence aplikis la rimojn.

Mi atentigas pri jenaj preseraroj. Aĉetintoj bonvolu korekti! Sur p. 83 la 3-a verso devas teksti:

„La lup', la lup'!” *La homoj venis kure,*

Sur p. 90, 3-a strofo, mankas la jena unua verso:

La azen' memoris tion. Aliĝoje,

En la 7-a verso sur p. 42 oni bonvolu korekti „oportune” al *oportuna*.

Kun viva ĝojo mi revidis la spritan ilustran talenton de Børge Hamberg, kiun mi aklamis okaze de *Rozoj kaj Urtikoj*.

R. Rossetti

LA NIGRA SPARTAKO *) de Geraldo Mattos. Eld.: *Esperantista Libro-Instituto*, Poŝtkesto 2552, Curitiba-Parana-Brazilo, 1955. 75 p. Formato: 11.5 x 16.

Laŭ la antaŭparolo de tiu ĉi volumo, 75paĝa, la jus fondita „Esperantista Libro-Instituto” en Curitiba, ĉefurbo de la ŝtato Paraná en Brazilo, komencis per ĝi eldoni beletran serion. Oni intencas eldoni kvar volumojn jare. Jarabono

estas dek kvin steloj (unu usona dolaro), unuopa volumo kostas 4 stelojn.

Tiu ĉi unua volumo estas rakonto pri okazoj en la 17a jarcento. Sklavĉasistoj kaptis negrojn en Afriko, kondukis ilin al Brazilo kaj vendis. Inter tiuj sklavoj estis potenca reĝo, Kam Golo, kiu liberevole fariĝis sklavo por liberigi kaj havigi al si virinon, kiun li amis. Sub la gvido de Kam Golo negroj ribelis kaj fondis propran civiton sur monto. Fine la portugaloj tamen ekstermis ilin. Kam Golo kun sia edzino kaj la filo jetis sin de la monto en abismon kaj pereis.

La historio estas epika, ne tre arte sed honeste kaj bone rakontita. La lingvo estas bona sed tie kaj tie vortoj estas pli-malpli neĝuste uzataj, rilate al la senco. La rakonto estas vere interesa. Laŭ la antaŭparolo ĝi ŝajne estas fondita sur veraj okazoj, pri kiuj ni loĝantoj de alia mondoparto nenion scias kaj bedaŭrinde ankaŭ per la antaŭparolo nenion ekscias. Ĉiukaze aĉetinda libro.

Stellan Engholm

ANALFABETO kaj BUTONO*)
Unuaktaj komedietoj de Branislav Nušić.
Tradukis Bojidar Trudić. Eldonis Serbia Esperanto-Ligo, Beograd. 1955. 32 p. en formato 17 x 11,5 cm.

La spirito de la fama REVIZORO de Gogol troviĝas en ĉi tiuj komedietoj, kiuj ambaŭ satire mokas la morojn de ŝtato-ficistoj. Sed la satiro estas pli milda kaj bonhumora ol tiu de Gogol, kaj nur la plej rutinema ŝtatservisto povas protesti kontraŭ ili.

En la unua teatraĵo distriktestro kaj liaj oficistoj ne scias la signifon de la vorto „analfabeto“ kaj tute maltrafe komprenas ĝin. La dua drameto estas pli farsa ol la unua. Oficisto invitita al ministra vespermanĝo perdas neanstataŭigeblan butonon.

Ambaŭ teatraĵetoj estas rekomendindaj por Esperantista grupo, kiu volas aranĝi distran vesperon.

La eldonadoj de la Serbia Esperanto-Ligo celas esti popularaj, kaj la tri volumetoj jam aperintaj certe meritas esti vaste konataj. Stilo kaj presado estas klaraj, enhavo interesa kaj ne cerbostreĉa kaj kosto modera.

Edward Ockey

LA POLVO DE L' MORTO*). Eld.:
Japana Esperanta Libro-kooperativo,
Nakacu-hamadoori 2-20, Ooojodo-ku,
Osaka, Japanujo. 41 p. Prezo 4 rpk.

Tiu ĉi libreto enhavas kelkajn artikol-etojn, kiuj priskribas la rezultojn de la elfalo de radioaktiva materio post la eksplodo de H-bombo en Bikini (marto 1954). Temas pri la morto de unu fiŝkaptisto, la malsano de aliaj, la malpurigo de granda kvanto de fiŝoj, kaj la falo de radioaktiva pluvo sur la japanan landon mem. Estas malfacile ne kredi la atestojn de tiuj kiuj mem suferis de la bombo. Se oni kredas iliajn vortojn, oni ne povas eviti la konkludon ke la afero estis multe pli grava kaj teruriga ol oni opinius post legado de la anoncoj

en la okcidenta ĵurnalaro. La japanaj esperantistoj, kiuj kompilis la libreton, alvokas al la homaro kontraŭstari la pluan eksperimentadon pri atombomboj. Kun tiu ideo ĉiu pacamanto konsentos!

La lingva nivelo ne estas alta; oni povus kritiki multajn frazojn. Tamen la valoro de la libreto ne kuŝas en ĝia literatura boneco; ĝi estas leginda pro la bildo kiun ĝi donas pri la eblaj teruraj efikoj de la pogranda malliberigo de atoma energio.

E. F. Relf

Miyazawa-Kenzi: GAUCHE LA 'ĈELISTO*) scenario de Pupa Teatro, trad. el la japana de Nozima-Yasutaro (broŝurita kun 3 bildoj). Eldonejo: Japana Esperanta Librokooperativo, Osaka. Prezo: 4 rpk.

Teatraĵeto, en kiu la figurojn rolas pupoj kaj bestoj. Gauche (elparolu „Goos“) estas violonĉelisto (ĉelisto = mallongigo). Naivmaniere ni konatiĝas kun la aminda pupo Gauche, kiu apartenas al pupa orkestro kaj kiu unue ne kontentigas la estron de la orkestro per sia ludado sur la instrumento. Tamen li fine triumfas ne nur kiel muzikisto, sed ankaŭ kiel komponisto.

La 42 paĝa libreto estas nete presita sur mezkvalita papero kaj tradukita en sufiĉe bona Esperanto.

J. L.

D. R. Duncan, Ph. D., B.Sc. ENGLISH-ESPERANTO CHEMICAL DICTIONARY*) (Angla-Esperanta Kemia Vortaro). 56 p., 19 x 12,5 cm, bindita. Publikigita por British Esperantist Scientific Association, de British Esperanto Association, Inc., London. Prezo: 10 ŝil.

Verki vortaron ne estas sinekuro. La uzanto ja postulas ne nur 98%-an, sed 100%-an akuratecon kaj kompletecon de la verko kiun li konsultas. Kaj estas ĝuste tiuj lastaj 2%-oj kiuj kaŭzas plej multan penon al la kompilanto. Recenzanto havas iom da sperto en tio, ĉar li okupis sin pri simila terminaro (ĝisnun ne eldonita) en la nederlanda lingvo, kaj ĝi postulis pli ol mil-horan laboradon.

La vortaro de Duncan estas nur Angla-Esperanta, ne inversa, sed tio apenaŭ povas esti ĝena por la uzanto, ĉar la traduko el Esperanto ĝenerale ne donas malfacilaĵojn. Kontraŭe, traduko el nacia lingvo, pro ĝia idiomo, ofte estas des pli malfacila. Pro tio la ĝisnunaj terminaroj de ISAE, cetere ankaŭ tre mankhavaj, ne donis al la uzanto tion kion li bezonis.

La verko de Duncan enhavas ĉirkaŭ 2500 terminojn. Li sisteme limigis la nombron da terminoj, ne enprenante kunmetitajn kaj derivitajn formojn. Tiel ekz. oni trovas nur nomojn de elementoj, sed ne de iliaj kombinaĵoj. La uzanto do devas scii, ke el kalio oni devenigas kalian kloridon ktp. En organika kemio oni jam devas esti pli singarda: el palmita acido oni formas palmitatojn. Sed oni ja povas supozi ke tiuj elementaj nomenklaturaj principoj estas bone konataj, kaj mi ĝenerale pravigas la aŭtor-

on, ke li ŝparis la spacon pri tiaj aferoj. Tamen estas okazoj, kie oni povas dubi pri la ĝusta traduko de derivaĵoj. *Part estas parto*, sed ĉu en *partial pressure*, *partial valency* oni povas diri *parti*? Kaj kio estas la „derivaĵoj“ de *lime*, kiel *calciferos*, *calcareous*? *Se capillary tube* estas kapilaro, kio estas *capillary membrane*, *capillary depression*? Mi povas imagi ke kelkloke estas duboj.

Ni tamen ne harfendu. Provpikoj ne montris gravajn mankojn. Kompreneble oni povas pli aŭ malpli profunde penetri en specialajn branĉojn. Metalurgiistoj, farmaciaj kemiistoj, biokemiistoj, teknikaj kemiistoj certe renkontos terminojn el siaj specialaj fakoj, kiuj mankas. Oni do prefere konsideru la vortaron kiel ĝenerale-kemian.

Kiel tia ĝi signifas gravan kolonon por la „konstruaĵo“ Esperanto. Multe pli da ili estas ankoraŭ bezonataj por finkonstrui ĝin, enkonduki ĝin en la fakan uzadon kaj doni al ĝi la aŭtoritatecon por efike konvinkan propagandon.

Dr. W. J. Nijveld

MULTAN DANKON

(Okaze de la 4a Internacia Esperanto-Ferio-Semajno en Krommenie)

Du angloj iris al la Zaano
Por partopreni en ferio:
Dupersona karavano:
D-ro Osborne... ankaŭ mi!

Inter alilandaj anoj:
Kvindek francoj kun Delaire¹⁾,
Svedo, finnoj kaj germanoj,
Kaj italoj... jen la ver'.

Enirinte urbodomon
De vilaĝo Krommenie²⁾,
Oni festis ĉiun homon
Per akcepta ceremoni'.

Tie oni trinkis kafon,
Mangis kukon kun plezur',
Poste havis fotografon
Kaj foriris por vetur'.

Dum la tuj sekvantaj tagoj
Oni gaje distris sin:
Muelejoj, maro, lagoj,
Cie pontoj... jes, sen fin'.

Tro rapide preterpasis
Ĉiutagaj programeroj,
Malfeliĉe ni postlasis
Adiaŭon al polderoj³⁾.

Fine en la festvespero
Ni disiĝis, ho' malĝoje,
Tamen restas la espero
Renkontiĝi alifoje.

Gastoj nun el plena koro,
Pro feliĉo, ĝuo, bel',
Volas diri, eĉ kun ploro,
„Krommenieers, Dank u vel"⁴⁾.

1) S-ro P. Delaire el Orleans.

2) Kelkajn kilometrojn nords de Amsterdamo.

3) Antaŭe akvo nun terpecoj.

4) „Krommenie-anoj, Multan dankon.“

F. Douglas Murphy

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefono ARNold 90-81

„GRAJNOJ EN VENTO”

CED ĵus ricevis informon pri nova provo disvastigi Esperanton kaj diskonigi ĝiajn celojn al lernantoj en lernejoj, kie oni nun instruas la lingvon. Temas pri komuna lerneja gazeto, redaktita en Esperanto de la lernantoj mem. S-ro Marcel Erbetta, Svislando, ĵus iniciatis tian komunan gazeton, sub la titolo „Grajnoj en Vento”. Laŭ lia klarigo, la grajnoj estas la lernantoj, la semantoj estas la instruistoj, kaj ke la junuloj fariĝu homoj dignaj, toleremaj kaj pacamaj estas la celo de la laboro.

La metodo estas unue grupigi en unu rondon 12 lernejojn, en kiuj oni instruas Esperanton, sed nur unu lernejo el unu lando, kio signifas, ke la rondo enhavas infanojn el 12 diversaj nacioj. Trifoje en la jaro, je difinitaj datoj, la instruisto de ĉiu lernejo en la rondo sendas sian materialon al la gvidanto de la rondo. S-ro Erbetta havas la honoron gvidi la unuan rondon. La materialo, en kvanto ne tro granda kaj sur papero samformata por ĉiuj, estas verkita de la lernantoj mem kaj konsistas el bildoj aŭ desegnoj kun suba klariga

esperanta teksto, el mallongaj rakontoj, priskriboj aŭ informoj, fakte el ĉio, kio povus interesi la infanojn mem. Antaŭ ol forsendi sian materialon al la gvidanto, la instruisto devas unue multobligi ĝin ĝis 15 ekzempleroj, tio estas unu por ĉiu lernejo en la grupo kaj 3 kromaj. Ricevinte la materialon, la gvidanto kunfiksas ĝin per iu simpla metodo, por ke estu 15 kajoroj, ĉiu enhavanta la materialon de la 12 lernejoj. Poste, por beligi la tuton la gvidanto aldonas al ĉiu kajero frontpaĝon kun alloga desegnaĵo, kolorigita se eble. Do ĉiu lernejo en la rondo, trifoje en la jaro, ricevas ekzempleron de SIA gazeto, kaj tio, espereble, instigas al la junuloj la senton ke ili apartenas al granda homgrupo el pluraj landoj, grupo tute ne fremda, ĉar per la internacia lingvo la anoj komencas kompreni unu la alian.

Kun la supra informo CED ankaŭ ricevis ekzempleron de la unua numero de „Grajnoj en vento”, tre laŭdinda provo. La enhavo de la gazeto, parte maŝinkribita parte manskribita, estas tutevidente la laboro de junuloj, tamen tre interesa, precipe por la junuloj en la rondo. Ŝajnas al ni ke ĉi tiu nova provo estas ne nur imitinda sed praktika laboro, ĉar ĝi kuŝas en la limoj de junulara kapableco. Ĉiuj instruistoj, kiuj interesiĝas pri la eksperimento kaj deziras pluajn detalojn, bonvolu sin turni al la inicianto S-ro Marcel Erbetta, Instruisto, Rue de Pins 66, Bienne-Biel 7, Svislando.

Se poste aliaj similaj rondoj formiĝas, CED petas ke la gvidantoj afable sendu al ĝi unu ekzempleron de la koncerna komuna gazeto. D. K.

Radio - Babiloj

(8)

La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas

Leterkesto

La radio-stacioj, kiuj regule dissendas Esperanto-programon, de tempo al tempo aŭ en parto de ĉiu dissendo disaŭdigas „leterkeston”: la anoncisto aŭ parolisto respondas leterojn, kiujn sendis geaŭskultintoj el pluraj landoj proksimaj aŭ, tre ofte, malproksimaj.

Ofte la respondo estas nur mallonga konfirmo de la ricevo kaj afabla saluto al la skribint(in)o, sed ĉi tiu havas agrablajn sensacion aŭdi sian nomon elparolata de malproksima samidean(in)o kaj saluton al sia adreso.

Eĉ se oni ne aŭdas alparolon al sia propra adreso, restas interese aŭskulti tian „leterkeston”, ĉar aŭdante plurajn nomojn de diversaj personoj kaj landoj, en kiuj ili loĝas, oni sentas sin ero de granda samideanaro kaj frakcio de entjero. Tio estas utila kaj kuraĝiga precipe por izolita Esperantist(in)o, kiu en sia propra loĝloko aŭ regiono ne ofte aŭ tute ne renkontas samidean(in)on kun kiu li (ŝi) povas paroli la ŝatatan lingvon internacian. Aŭdante salutojn al gesamideanoj en Finnlando, Norvegujo, Skotlando, Nederlando, Ĉeĥoslovakujo, Hispanujo, Maroko, Grekujo, Brazilo kaj aliaj landoj, oni konscias, ke oni ne estas la sola Esperantist(in)o en la mondo, sed ke reto esperantista sterniĝas sur grandega areo. Ni nur esperu, ke tiu reto pli kaj pli densiĝos.

La ĉefa, plej grava valoro de „leterkesto” estas, ke ĝi montras al la direkto de la stacio la interesiĝon de la geaŭskultantoj. Plena leterkesto kuraĝigas la direkcion kaj instigas daŭrigi la Esperanto-dissendojn. Malplena leterkesto malentuziasmiĝas la direkcion kaj eble ĉesigas la Esperanto-dissendojn kaj tio estus ja bedaŭrinda afero.

Ni, gesamideanoj, zorgu, ke la leterkesto estu plena.

Raportu!

Skribante al radio-stacio, vi nepre ne forgesu mencii kiun ondon vi aŭdis kaj kie kaj kiel. El tiaj teknikaj informoj la direkto konkludas, ĉu ĝi devas ŝanĝi siajn dissendojn aŭ ne. Radio Roma plurfoje ŝanĝis la ondlongojn de siaj Esperanto-dissendoj, verŝajne pro malfavoraj raportoj de la geaŭskultintoj. Mi memoras, ke mi plurfoje plendis, ke la ondo 50,34 m estas malagrabla ĝenata de bruego de aliaj stacioj, kiuj havas proksimume la saman ondlongon. Verŝajne ankaŭ aliaj geaŭskultintoj plendis ŝanĝi la ondlongon kaj 2/V. 1956 mi aŭdis la interesajn novaĵojn klare kaj forte laŭ la ondlongo 41,24 m. La ŝanĝo do estis por mi tre favora; espereble ankaŭ por la aliaj geple(n)dintoj.

Se vi estas malkontenta pri Esperanto-dissendo, ĉar la Esperanto-sonoj dronas en diverslingva kaj -sona kakofonio, ne decidu „neniam plu aŭskulti Esperanto-radio-programon”, sed informu la direkcion de la koncerna stacio pri via malagrabla sperto kaj eble poste vi aŭdos la stacion klarege. Tiel la radio-geaŭskultantoj povas per siaj raportoj tre favore influi la kvaliton de la dissendoj.

Ni ĉiam memoru la devizon presitan super ĉi tiu rubriko!

S. S. de Jong

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro. 286

La 1-an de septembro 1956

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aŭgusto kaj ankaŭ por komparo, je la fino de aŭgusto 1955:

	1955	1956
Asociaj membroj	6492	11601
Individuaj membroj		
MJ	917	884
MA	3907	4273
MS	809	722
Pat.	9	9
DM	290	292
HM	57	54
	12481	17835

DELEGITOJ.

Germanujo.

Kamen (Westfalen) D. S-ro Theodor Henneberg, Okulkuracisto, Bahnhofstr. 46c.

Hungarujo.

Budapest (Pest-megye) FD (Juro): D-ro Ignác Balla, pensiita urba-ĉefprokuro-ro, XIV. Nagy-Lajos k. u. 203.

Israëlo.

Kirjat Jam (Cafon) FD (Literaturo): S-ro Ota Ginz, Shd. H. Szold 11, Kirjat Jam Bet.

Neve Hadasa, FD (Vivreformo): Vakas.

Nov-Zelando.

Stratford (Taranaki) D: Vakas.

Pollando.

Bydgoszcz (Pomorze) D.: S-ro Bogdan Sadowski, Kuracisto, Szpital Wojewódzki.

Warszawa FD (Fervojaj aferoj): S-ro Jozefo Arszennik, Fervojisto, Palmo-wa-strato 16, Warszawa-Zacisz.

Svislando.

Zürich VD: Vakas.

Usono.

Little Rock (Arkansas) D.: Vakas.

Milan (Michigan) FD (Elektro-tekniko): Vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956

667. Bloch, S-ro Hans, Saarbrücken, Sarlando.
 668. Björkstrand, S-ro E., Skelleftea, Svedujo.
 669. Unchitti, S-ro C. L., Bangkok, Tajlando.
 670. Cross, S-ro O. H., Church Hill, Usono.
 671. Bagoë, S-ro Anderson, Saigon, Viet Nam.
 672. Banham, S-ro F. R., Essendon, W. 5, Aŭstralio.
 673. Abreu, S-ro Aécio, Rio de Janeiro, Brazilo.
 674. Abreu, D-ro Modesto Belmonte, Rio Grande do Sul, Brazilo.

675. Alves, S-ro Carlos O. de, Salvador, Brazilo.

676. Câmara, S-ro Romeu, Olinda, Brazilo.

677. Castaneira, S-ro Jolio, Bom Sucesso, Brazilo.

678. Cavalcanti, S-ro Adao B. dos S., Vitoria de Santo-Antao, Brazilo.

679. Chaves, S-ro Hernani A. Fernandes, Rio Grande do Sul, Brazilo.

680. Cunha, S-ro Joao Baptista Oliveira, Rio de Janeiro, Brazilo.

681. Doin Vieira, S-ro Eugênio, Florianopolis, Brazilo.

682. Flores, Enĝ. Alberto, Estado do Rio, Brazilo.

683. Hentschel, S-ro Norberto W., Porto Alegre, Brazilo.

684. Juruena, S-ino C. A. Zuhlke, Rio de Janeiro, Brazilo.

685. Kalonay, S-ro Estevam, Juiz de Fora, Brazilo.

686. Knoedt, S-ro Leopoldo H., Salvador, Brazilo.

687. Machado, S-ro J. Custódio, Tupaciguara, Brazilo.

688. Marques, S-ro Abel, Rio de Janeiro, Brazilo.

689. Morais, S-ro Arminio de, Rio de Janeiro, Brazilo.

690. Neto, D-ro Belizario R., Lajes, Brazilo.

691. Neves, S-ro Divino, Pirapora, Brazilo.

692. Nunes, D-ro M. Ritter, Niterói, Brazilo.

693. Oliva, S-ro Santiago, Sao Paulo, Brazilo.

694. Oliveira, D-ro Ivo Vivas de, Salvador, Brazilo.

695. Oliveira, S-ro J. Francelino de, Baturité, Brazilo.

696. Pereira, S-ro Evaristo Manoel, Niteroi, Brazilo.

697. Sampaio, S-ro Angelo G. F., Belo Horizonte, Brazilo.

698. Silva, S-ro Wladimir S., Rio de Janeiro, Brazilo.

699. Souza, D-ro Joao Baptista Melo e, Rio de Janeiro, Brazilo.

700. Torres, S-ro F. de Assis, Rio de Janeiro, Brazilo.

701. Urbat, S-ro H.-Herbert, Mato Grosso, Brazilo.

702. Verde, D-ro E. Villa, Rio de Janeiro, Brazilo.

703. Atkeninson, S-ro G. B., London, W. 3, Britujo.

704. Daveau, S-ro Th., Seine-Port, Francujo.

705. Lavallee, S-ino Hélène, Le Havre-Sanvic, Francujo.

706. Barkhausen, S-ro Heinz, (23) Bremen-Sebaldsbrück, Germanujo.

707. Mc. Culloch, S-ro Robert C., Freising, Germanujo.

708. Galassi, S-ro Virgilio, Milano, Italujo.

709. Zagradišnik, S-ro Franec, Trbovlje III, Jugoslavujo.

710. Forsberg, S-ro Stig-O. Sarpsborg, Norvegujo.

711. Sakowicz, S-ro Roman, Nowa Sól, Pollando.

712. Lind, S-ro E., Trollhättan, Svedujo.

713. Berry, S-ro Jay, Seattle, Usono.

714. Gamble, S-ro J. H., Bethpage L.I., Usono.

715. Holmes Ford, S-ro J., Los Angeles 12, Usono.

716. Knox, S-ro Wm. A., Cloverdale, Usono.

717. Sattley, S-ro Kirk, Chicago 11, Usono.

718. Tobusch, S-ro Herman, Chicago, Usono.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Wise, S-ro Frank, Gisborne, Nov-Zelando.

DONACOJ AL LA ĈENERALA KASO
 R. Barta, 1,65 gld.; S-ino Combebias, 3,— gld.

DONACO

AL FONDAĴO-EKSPOZICIO

N.N.: 32,20 gld.

DONACO AL A.P.O.:

F-ino M. Boulton, 106,07 gld. honore al la memoro de G. P. Johari.

Al ĉiuj donacintoj tutkora dankon. Ni atentigas ĉiujn donacemulojn ke ankoraŭ tre soifas la Fondajo-Ekspozicio pro la grandaj kostoj en Strasburg kaj Kopenhago.

REKLAMOJ JARLIBRO 1957

Ĉu vi jam varbis reklamojn? Faru vian eblon kaj rapidu! Bonvolu sendi la reklamojn al la Administra Oficejo antaŭ la 15-a de oktobro.

KOTIZOJ 1957

Por ke evoluu kiel eble plej glate la laboroj en la Oficejo kaj ne estiĝu tro granda premo en la jarfino pro alfluo de 6000 kotizoj samtempe, ni afable petas niajn individuajn membrojn pagi la kotizon por 1957 kiel eble plej frue. Koran dankon anticipe pro tiu granda helpo. Ni atentigas denove, ke la kotizo por MJ

fariĝis la duono de kotizo por MA, do 5 n. gld. La aliaj kotizoj restis sensanĝaj.

M. H. Vermaas,
Administranto.

En la Administra Oficejo de UEA estas loko por oficist(in)o, bone konanta la lingvon kaj Movadon, kapabla memstare labori. Scio pri librotenado estas rekomendo. Interesiĝo pri la Asocio nepre kondiĉo. Salajro laŭ kapablo. Loĝebleco ekzistas. Detalaj leteroj kun informoj pri kvalifikoj kaj antaŭaj oficoj al la Administranto de UEA, Fino M. H. Vermaas, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

ANONCETOJ

La Nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Korespondanta Servo Mondskala havigas korespondantojn el pli ol 30 landoj laŭ dezire. Skribu, indikante vian aĝon kaj aldonante repondkuponon al: Daniel LUEZ, Boulevard Brossolette, LAON (Aisne), Francujo. Naciaj Esperanto-gazetoj bonvolu afable represi tiun ĉi anonceton.

Bonvolu helpi fondon Esperanto-ekspozicion sendante esperantajojn al nova Esperanto-klubo, 8 South Street, Battery Point, HOBART, Tasmania, Aŭstralio.

Prof. Pál Liszy, Fürst Sándor-u. 14, SZÉKESFEHÉRVÁR, Hungario, dezirante aranĝi kurson, kaj organizi fakrondon por la lernantoj de sia urba gimnazio, petas vian afablan apogon per bildkartoj, leteroj aŭ esperantlingvaj presajoj. Respondo estas certe garantiata.

24-jara italo, universitata studento kaj instruisto, deziras korespondi pri literaturo, politiko, socia vivo, vojaĝoj, kulturo kun ĉiulandaj gejunuloj. Lingvoj: esperanto, sveda, norvega, franca, itala. Certe respondos. Filippo Franceschi, Fratelli Bandiera 8, Padova, Italio.

Stenografio: Mi deziras aĉeti stenografiajn esperantajn metodojn de ĉiuj landoj kaj korespondi pri stenografiaĵo. Certa respondo. Paulo Amorim Cardoso, Postkesto 883, Fortaleza-Ceará, Brazilo.

Adressanĝo: J. Ernesto Guillem, Marqués de Caro 6, 2°, VALENCIA, Hispanujo.

Mi deziras korespondantinojn — ne pli ol 26-jara (mia aĝo) en Finnlando kaj Islando. Prefere interesatoj pri okaza interŝanĝo de nacilingvaj gazetoj k.t.p. Resp. gar. D. Kenrick, 26 Onslow Gdns, London N. 10, Anglujo.

Ne multaj libroj aperintaj dum la lastaj jaroj havis tian sanigan influon al nia lingvo kiel „Du Malsanoj en Esperanto” de H. A. de Hoog. Tial ĉiu esperantisto havanta lingvan ambicion kaj amon al Esperanto legu ĝin. Havebla

rekte de la eldoninto aŭ de via nacia Esperanta eldonejo aŭ de la libroservo de U.E.A. Prezo sv. kronoj 4,40 inkl. sendkostojn. Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo, Poŝtĝiro 34 34 81.

21 jara finna terkulturisto deziras korespondi kun komencantoj. La intereso: Esperanto kaj motorciklado. Adreso: Jouko Kinnunen, Permonen Viitasari, Finnlando.

Bahaa Kredo — Kiu deziras ricevi informojn pri tiu nova mondreligio, fondita de Baha'u'llah en 1844, kies ĉefprincipoj interalie estas unueco de la homaro, abolo de superstiĉoj, de rasaj, naciaj, politikaj, klasaj kaj religiaj antagonismoj, establo de Internacia Tribunalo de Justeco, adopto de Internaciaj skribo kaj lingvo, sin turnu kun int. poŝta repondkuponon al la fakdelegito por Bahaismo: Manuel Freitas, Rua do Monte da Lapa, 49-1, PORTO, Portugalio.

Ĉu mi trovos viron 45–50 jaraĝan kiu estas tiel sola kaj izolita kiel mi, kiu eble volas unuigi la du solajn vivojn por trovi komunan feliĉon. Mrs. May Danning, c/o Mrs. M. Green, P.O. Box 137, Kitwe, Northern Rhodesia, Africa.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 s 6p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, London W.9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Anat. Voloĥov, USSR, Moskvo, Postbox 996, deziras ricevi nacilingvajn foto-revuojn. Interŝanĝe sendas anglalingvajn kaj franclingvajn sovetajn jurnalojn.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdaul 5, Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Gramofonaj diskoj de UEA

En decembro aperis:

BOLOGNA 1955. SALUTPAROLADOJ
de 23 diversnaciaj reprezentantoj.

JUS APERIS:

LA KULTURA VALORO DE LA INTERNACIA LINGVO
de Prof. D-ro Ivo Lapenna.

Speco de diskoj: 45 r.p.m.

Prezo por ĉiu disko (kun aldonita presita teksto) 6 guld.
Mendu ĉe U.E.A.

Adam Mickiewicz:

SINJORO TADEO

aŭ

la lasta armita posedopreno en Litvo

Nobelara historio de la jaroj 1811 kaj 1812 en dekdu libroj verse

Tradukita de ANTONI GRABOWSKI

Eldonejo „Polonia” Varsovio, 1955.

Prezo nur 6. n.gld., 24 steloj.

MENDU Ĉe U.E.A.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam